

EL POPOLA ĈINIO

8

1973





Mjaŭaj infanoj amas ĈPLA-anon.

Foto de Song Hoŭgjun

Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio en Ĉinio

De la 4-a ĝis la 11-a de junio, 1973, laŭ la invito de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, la Delegacio de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko sub la gvido de kamarado Le Duan, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj kamarado Pham Van Dong, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ĉefministro de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, faris oficialan amikan viziton al la Ĉina Popola Respubliko kaj ricevis varman bonvenigon de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo.

La 5-an de junio, kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, intervidiĝis kun kamaradoj Le Duan, Pham Van Dong kaj Le Thanh Nghi. La intervidiĝo iris en la atmosfero saturita de frateco inter la

ĉina kaj vjetnama popoloj. Kiam kamaradoj Le Duan, Pham Van Dong kaj Le Thanh Nghi venis, Prezidanto Maŭ firme manpremis kun ili, brakumis ilin kaj esprimis varman bonvenigon al ilia vizito al Ĉinio. Prezidanto Maŭ faris tre intiman kaj amikan konversacion kun la vjetnamaj kamaradoj. En la nomo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio, de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj de la vjetnama popolo, kamarado Le Duan varme salutis Prezidanton Maŭ, kaj rakontis al li pri la venko de la vjetnama popolo en la kontraŭusona naciŝava milito kaj pri la justa batalo de ili nun kondukata. Kamarado Le Duan diris: "Ni dividas inter ni suferon kaj ĝojon kaj kune venkas." Prezidanto Maŭ esprimis gratulon al la partio, registaro kaj popolo de Vjetnamio. Prezidanto Maŭ diris: "Vjetnamio apartenas al la vjetnama popolo, sed ne al la reakciuloj de Vjetnamio, des pli ne al imperiismo." Prezidanto Maŭ deziras al ili pli grandan venkon en la estonteco.

Kamarado Ĝou Enlaj kaj aliaj gvidantoj de la partio kaj registaro de Ĉinio varme bonvenigas la Vjetnaman Partian kaj Registararan Delegacion estratan de kamaradoj Le Duan kaj Pham Van Dong.





Prezidanto Maŭ manpremas kun kamaradoj Le Duan, Pham Van Dong kaj Le Thanh Nghi kaj esprimas varman bonvenigon al ilia vizito al Ĉinio.

Prezidanto Maŭ faras tre intiman kaj amikan konversacion kun kamaradoj Le Duan, Pham Van Dong kaj Le Thanh Nghi.





En la 7-a de junio, pli ol dekmil loĝantoj de Pekino solene kunvenis por varme bonvenigi la Vjetnaman Partian kaj Registaran Delegacion. Kunbatalantoj de Ĉinio kaj Vjetnamio ĝoje kunestis, kune celebris la grandan venkon de la vjetnama popolo en la kontraŭsona naciŝava milito kaj prikantis la plifirmiĝon kaj progreson de la granda amikeco kaj batala unuiĝo inter la ĉina kaj vjetnama popoloj. La mitingo donacis al la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio lanfadenan brodaĵon pri la intima intervidiĝo de Prezidanto Ho Chi Minh kun Prezidanto Maŭ dum lia vizito al Ĉinio. La Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio donacis al la pekina popolo silkan flagon kun surskribo en la vjetnama kaj ĉina lingvoj "Eterne vivu la granda amikeco kaj la batala unuiĝo inter la vjetnama kaj ĉina popoloj".

Ambaŭ flankoj de Ĉinio kaj Vjetnamio faris interparoladon en varmega atmosfero pri la plua firmigo de amika kaj kunlabora interrilato inter ambaŭ partioj kaj landoj, pri la nova situacio de la revolucia batalo de la vjetnama popolo kaj pri aliaj problemoj interesaj por ambaŭ flankoj kaj publikigis komunan komunikon. Por kuraci la militvundon, restarigi kaj disvolvi la nacian ekonomion, fortigi la nacidefendon kaj plue firmigi la batalan amikecon kaj unuiĝon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj post la fino de la milito en





Vjetnamio, en la 8-a de junio la registaroj de Ĉinio kaj Vjetnamio subskribis en Pekino Interkonsenton pri Senpaga Ekonomia kaj Milita Helpo de Ĉinio al Vjetnamio en 1974.

Dum la vizito en Ĉinio, la vjetnamaj kunbatalantoj ĉeestis la amuzan vesperon aranĝitan de la Departemento de Internaciaj Rilatoj de CK de KPC kaj la Ministerio de Eksteraj Aferoj kaj aprezis kantojn, dancojn kaj akrobataĵojn. Ĉefministro Pham Van Dong kaj Vicĉefministro Le Thanh Nghi k.a. vjetnamaj kamaradoj pririgardis en Pekino ankaŭ ekspozicion de metiartaĵoj. Poste la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio forlasis Pekinon kaj veturis al Hi-an kaj Jan-an por fari vizitadon. La vjetnamaj kunbatalantoj pririgardis la Popolan Emajlajan Fabrikon de Hi-

an, kiun vizitis la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh antaŭ 14 jaroj. Sub la akompano de Ĉefministro Ĝou Enlaj k.a. ili vizitis la iamajn loĝejojn de Prezidanto Maŭ en Jan-an kaj la Muzeon pri la Gvidado de Prezidanto Maŭ en Jan-an al la Ĉina Revolucio.

La Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio sukcese finis la oficialan amikan viziton al Ĉinio kaj revenis de Hi-an al sia lando en la 11-a de junio per speciala aviadilo kunportante la batalan amikecon de la ĉina popolo al la heroa vjetnama popolo. La amika vizito de la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio al nia lando faris novan kontribuon al la plua firmigo kaj disvolvo de la granda amikeco kaj batala solidareco inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

En la mitingo ambaŭ flankoj interŝanĝis donacaĵojn de lanfadena brodaĵo kaj silka flago.





Podio de la mitingo okazigita de la pekina popolo por varme bonvenigi la Vjetnaman Partian kaj Registaran Delegacion

Gvidantoj de la partio kaj registaro de Ĉinio kaj la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio en interparolado





La Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio okazigis grandan dankan feston. Jen la gastoj kaj gastigantoj paŝas en la salonon.



Subskriba ceremonio de la Interkonsento de Senpaga Ekonomia kaj Milita Helpo de Ĉinio al Vjetnamio en 1974

Akompanate de kamarado Ĝou Enlaj k.a. Le Duan, Pham Van Dong, Le Thanh Nghi k.a. vjetnamaj kamaradoj vizitis iaman loĝejon de Prezidanto Maŭ. Jen foto farita antaŭ la loĝejo.





La honorindaj vjetnamaj gastoj en la Popola Emajlaja Fabriko de Hi-an

Kamarado Ĝou Enlaj k.a. kaj pli ol trimil loĝantoj de Hi-an varme adiaŭas
Le Duan, Pham Van Dong, Le Thanh Nghi k.a. vjetnamajn kamaradojn.



Novtipa Popola Armeo

Tempo: La 13-an de majo, 1973

Loko: Kunveno de la komandejo de "La Unua
Regimento de Ginan"

Ĉeestantoj:

Ju Hijun regimentestro

Liu Ĉangcun vicestro de la politika sekcio de
la regimento

Ĉen Ĉungeng politika direktanto de bataliono

Feng Ŝuaj kompaniestro

Tang Guantong kompaniestro

Vang Ŝuangfu politika direktanto de la higi-
ena grupo

Ĉeng Ŝoukjuan vickompaniestro

Man Fuŝuj subplotonestro

Veĵ Ĉanglin subplotonestro

Ĝu Licaj rekruto

Li Ĉangvan rekruto

Ju Hijun:

Hodiaŭ ni kunsidas laŭ la peto de kamaradoj
de «El Popola Ĉinio» por paroli pri la popola
armeo de Ĉinio. Tiu temo estas tre ampleksa.
Do ni iom parolu pri nia propra regimento.



*"La Unua Regi-
mento de Ginan"
en la Liberiga Mi-
lito*



Ju Hijun



Liu Ĉangĉun



Ĉen Ĉungeng



Feng Ŝucaj

PRENI PAFILON POR LA POPOLO

Ju Hijun:

La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas popola armeo kreita kaj direktata de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio. La armeo devenas de, sin apogas sur kaj tutkore servas al la popolo. Antaŭ la Liberigo ĝi faris longdaŭran kaj ekstreme penan bataladon por renversi la tri montegojn de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj starigi la popolan reĝimon. Post la Liberigo, direktate de la armeokonstrua linio de Prezidanto Maŭ, ĝi heredis kaj disvolvis la revolucionan tradicion formitan en la militaj jaroj kaj faris siajn farendajn kontribuojn por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj firmigi la proletaran diktaturon.

Nia regimento estis fondita vintre de 1937 en Giaŭdong-duoninsulo de Ŝandong-provinco. Dum la pasintaj 36 jaroj ĝi senĉese kreskadis sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

Mi aliĝis al tiu ĉi regimento en la Liberiga Milito. Tiam mia hejmvilaĝo tute aliĝis sub tretado de la japanaj agresantoj kaj kuomintangaj reakciuloj kiuj faris al ĝi barbarajn prirabadon, forbruligon kaj mortigon. La vilaĝanoj perdis sian hejmon. Ne havante elirejon ni malriĉuloj povis nur ekpreni pafilojn sub la gvido de la Kompartio kaj batali kontraŭ la bienularo kaj kuomintanga reakciularo.

Liu Ĉangĉun:

Tuj post nia armeaniĝo la gvidantaj kamaradoj de la trupo faris al ni edukon pri tio ke por kiu ni devas batali, kaj ke la popola armeo povas gajni venkojn en batalo nur firme starante ĉe la flanko de la popolo. Kanto, kiun ni ofte kantis tiutempe, diras: "Kamaradoj, diru al mi, de kie venas viaj

mangaĵoj kaj vestoj. Ĉio ĉi tio estas de la popolo. Fiŝo ne povas vivi sen akvo kaj ni ne povas venki en batalo sen subteno de la popolamasoj."

Ju Hijun:

Prave! Ĉar ni bone komprenis ke ni batalas por la interesoj de la popolo, tial ni batalis kuraĝe kaj ne timis sinoferon. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito nia regimento partoprenis en multaj malfacilaj bataloj kaj akiris multajn venkojn.


En la jaroj de revolucia milito ok kompanioj de nia regimento ricevis 18 honorajn titolojn kaj 27 kadroj kaj soldatoj fariĝis batal-herooj. Kaj krome aperis dek bravuloj de Maŝi-monto. En la kampanjo por liberigi la urbon Ginan nia regimento ricevis la honoran titolon "La Unua Regimento de Ginan" donitan de la Komisiono de CK de KPCĈ pri Militaj Aferoj. Tiuj venkoj, kompreneble, devas esti ŝuldataj al la gvido de la Partio kaj ili estas ankaŭ la venkoj de la armeokonstrua linio de Prezidanto Maŭ.

La batalo por konkeri Ginan okazis en septembro de 1948. Tiutempe, observante la batalan orientilon elmetitan de Prezidanto Maŭ, la Orientĉinia Kampa Armeo komencis la kampanjon al Ginan por disrompi la neston de la malamikoj en Ŝandong-provinco, unuigi la liberigitajn regionojn de la orienta kaj norda Ĉinio kaj per tio pli rapide kaj forte antaŭenpuŝi la strategian kontraŭatakton.

Ginan estis tiam grava loko por Kuomintango en strategio. La urbo havis internan kaj eksteran partojn. La muro de la interna urbo altas je 14 metroj kaj larĝas je 32 metroj je ĝia supro ĉe la loko atakata de nia regimento. Tuj ekster la muro ĉirkaŭfluas rivero profunda je 2-5 metroj kaj larĝa je 15 metroj. Ĉe la supra, meza kaj malsupra partoj



Tang Guantong



Vang Ŝuangfu



Ĉeng Ŝoŭkjuan



Man Fuŝuj

de la muro estis formita fajroreto kun granda potenco. En la ĉirkaŭaĵo de dekoj da kilometroj de Ginan ĉie troviĝis kaŝaj kaj malkaŝaj fortikaĵoj. La situo kaj defendaj aranĝoj faris la urbon Ginan facile defendebla kaj malfacile konkerebla.

Liu Ĉangĉun:

Tiam Vang Jaŭvu, altranga generalo de Kuo-mintango, persone direktis la batalon en Ginan. Li fiere fanfaronis: "Ginan estas tiel fortika ke dek mil homoj ne povas ĝin konkeri se unu ĝin defendas. Mi garantias, ke ĝi eltenos fortan atakon de pli ol tri monatoj." Efektive ni nur uzis ok tagnoktojn de la komenco de la kampanjo ĝis la liberigo de Ginan kaj konkeris ĝin nur per malpli ol du diurnoj.

Ju Hijun:

Dum konkerado de Ginan nia regimento prenis sur sin la taskon de ĉefa atako. Penetrinte en la eksteran urbon la sepa kompanio de nia regimento prenis la taskon disrompi la defendon de la malamikoj ĉe la sudoriento de la interna urbo por elhaki vojon por ekstermi la malamikojn en la urbo. Kvankam la sepa kompanio malsukcesis tri

fojojn en la atako, tamen ili persistis ĉe batalado. La kvara atako estis komencita sub ŝirmo de niaj kanonoj, la estro de la dua subplotono Li Jonggiang la unua surgrimpis la urbomuron.

Liu Ĉangĉun:

Simile al tigreto kamarado Li Jonggiang batalis tre kuraĝe. Kiam li surgrimpis la muron, la malamikoj tuj blokadis la eskalon per intensa pafado kaj pro tio aliaj kamaradoj estis baritaj malsupre de la muro. Li Jonggiang sola brave luktis dum dekelkaj minutoj, kaj vundis kaj mortigis dekojn da malamikoj per malpeza maŝinpafilo deprenita de malamiko. Kvazaŭ najlo li brave luktis ĉe la rompita punkto.

Ju Hijun:

La sepa kompanio kaj aliaj frataj trupoj ensturmis en Ginan ĝuste ĉe la punkto rompita de Li Jonggiang. La batalo rapide disvolviĝis al la profundo de la urbo kaj pli ol centmil malamikoj estis ekstermitaj.

Kiam ni sturmis en la urbon, fanfaronulo Vang Jaŭvu forkuris tra tunelo. Sed li ne povis for-

Vej Ĉanglin (maldekstre)



Ĝu Licaj (meze)



Li Ĉangvan (dekstre)



fugi el la manoj de la popolo kaj baldaŭ estis kaptita.

ZORGI KAJ AME PROTEKTI UNU ALIAN

Liu Ĉangĉun:

La kaŭzo ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo povas teni ardan batalvolon en ĉia ajn cirkonstanco kuŝas en tio, ke ĝi havas bonan internan solidarecon. Niaj kadroj kaj batalantoj, kvankam diferencaj en servojaroj kaj oficoj, tamen estas egalaj en politiko, ĉar ili estas klasaj fratoj venintaj el diversaj lokoj kolektiĝintaj por komuna revolucia celo. Jam frue dum la batalo en Ginggaŝang-montaro en 1928, Prezidanto Maŭ jam klare difinis por la armeo disciplinon ke **“la oficoj ne devas bati soldatojn; oficoj kaj soldatoj ricevas egalan traktadon”**. Kaj poste Prezidanto Maŭ difinis, ke **“unuco inter oficoj kaj soldatoj”** estas unu el la tri bazaj principoj en la politika laboro de nia armeo, postulante ke **“niaj kadroj devas zorgi pri ĉiu batalanto kaj ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian”**.

Li Ĉangvan:

Mi multe spertis pri tio.

Mi estas rekruto veninta de Siĉuan en la kuranta jaro. Kiel sudano mi malsaniĝis pro nealkutimiĝo al ĉi-tieaj klimato kaj manĝaĵoj. Kaj krome mi iom malkontentis pro tio, ke mi deziris fariĝi sanitaristo sed fariĝis infanteriano.

Sed kamarado Tang Guantong, estro de nia kompanio, ne kritikis min. Li enservigis min kiel kurieron en la komandejo de la kompanio kaj lasis min dormi en lia ĉambro. La kompaniestro multe zorgas pri mi en la vivo. Kiam mi malsaniĝis, li alportis al mi manĝaĵon. Por helpi min politike li ofte kore interparolas kun mi en libera tempo.

Tang Guantong:

Koncerne al Malgranda Li ni speciale diskutis en la partifilia kunveno de la kompanio. Ni opiniis, ke lia sanstato estas ne tiel bona, sed pli grave estas ke li ankoraŭ ne komprenas, por kio li devas soldatiĝi. En la unuaj tagoj post soldatiĝo li faris ĉion fervore kaj energie, tamen la fervoro tuj malvarmiĝis je renkonto de malkontentaj aferoj. Por pli bone lin helpi ni decidis ke li estu kuriero en la komandejo de la kompanio.

En iu vespero mi babiladis kun Malgranda Li por altigi lian politikan konscion per klasa eduko.



Ju Hijun rakontas al la komandantoj kaj batalantoj pri la glora tradicio, ke la trupo kompandis sur strato dum liberigo de Ŝanhaĵo.

Kiam mia parolo venis al la famaĉa granda tirano-bienulo Liu Vencaĵ, li tuj interrompis, ke li bone konis la krimojn de la bienulo, ĉar li jam rigardis la argilajn figurarojn *Rentokolekta Korto*.

Ju Hijun:

Jes, nia trupo ĉiam atentis pri la klasa edukado.

Li Ĉangvan:

Tiuvespere la vortoj de la kompaniestro forte tuŝis mian koron. Ankaŭ mia familio ekvivis feliĉan vivon kiel miloj kaj miloj da laborantaj popoloj post la Liberiĝo. La kompaniestro diris, ke tion ni ŝuldas al Prezidanto Maŭ kiu gvidas la ĉinan popolon en faligo de la reakciularo kaj stariĝo de la popola reĝimo. Por la emancipo de la popolo multaj revoluciuloj oferis sian vivon. Hodiaŭ la Partio kaj la popolo donis al mi la pafilon por ke mi defendu la potencon de la proletaro, kaj mi ne devas vanigi la esperon de la Partio kaj popolo.

Sub konstanta helpo de la kompaniestro kaj aliaj kamaradoj mi komprenis la veron de revolucio kaj iom post iom ĝustigis al mi la motivon esti soldato. Mi ekkomprenis, ke ĉiu ajn laboro en nia revolucia armeo estas por la popolo kaj devas esti bone farata.

Tang Guantong:

De tiam Malgranda Li sereniĝis en humoro. Li aktive plenumas sian laboron, partoprenas ankaŭ en milita trejnado kaj lernado por klerigo. Krome li ankoraŭ helpas min fari politikan ideologian laboron al la aliaj kamaradoj.

Liu Ĉangĉun:

Reciproka zorgo kaj reciproka helpo inter kamaradoj estas bona tradicio de nia armeo.

Vej Ĉanglin:

La vortoj de la kamaradoj rememorigis al mi nian kompaniestron kamaradon Li Hianglin, kiu savis min el danĝero.

Iutage antaŭ kvar jaroj nia kompanio ekzamenis nin pri grenadĵetado. Antaŭ la ekzameno la kompaniestro refoje klarigis al ni la funkcion de grenado kaj la atentindajn punktojn pri ĵetado. Kiel rekruito mi kvankam akiris teoriajn sciojn pri grenadĵetado kaj faris plurajn ekzercojn, tamen tiu estis la unua fojo por mi ĵeti efektivan grenadon, tial mi iom timis. En la momento kiam mi tiris la meĉon de grenado por forĵeti, mia piedo glitis pro tro forta movo kaj la grenado falis el mia mano. Mi stultiĝis kaj eĉ ne sciis kien falis la grenado.

La kompaniestro apud mi trovis, ke la grenado estas turniĝanta post mi kun fumo kaj sur la loko

je dek metroj for de ĝi kuŝas dekoj da grenadoj kaj apud mi estas ankaŭ skribisto kiu faras registrojn. En tiu kriza momento li kriegis plengorĝe: "Tuj vin ŝirmu!" Forpuŝante min maldekstren, li piedbatis la grenadon en la dekstran ŝirmujon. Tuj post kiam li sin turnis kaj kovris min per sia korpo, eksplodis la grenado. Mi kaj la skribisto restis sekuraj, tamen la kompaniestro serioze vundiĝis.

Ju Hijun:

Li estas multloke vundita sur la dorso kaj ĝis nun ankoraŭ restas en li fragmento neelprenita.

Vej Ĉanglin:

Mi ege ĉagreniĝis pro la akcidento, sentis min kulpa antaŭ la kompaniestro kaj atendis punon. La batalionestro kaj kompania direktanto plurfoje interparolis kun mi por ke mi forĵetu la spiritan balaston, elĉerpu lecionon el la akcidento kaj diligente min trejnu por altigi militan teknikon kaj defendi la patrolandon.

Poste mi vizitis la kompaniestron. Survoje al la hospitalo mi pensis, ke se la kompaniestro farus al mi severan kritikon, tio eble iom mildigos mian doloron. Tamen kiam mi vidis la kompaniestron, mi eklarmis nereteneble. La kompaniestro konsolis min kaj memkritikis ankaŭ: "Mi malbone aranĝis la ekzamenon."

La nobla ago de la kompaniestro bone edukis min. La varma zorgo kaj granda helpo donitaj de la gvidantaj kaj aliaj kamaradoj precipe post la akcidento multege min kortuŝis. De tiam mi pli amas nian armeon kaj decidis pli bone plenumi mian laboron kiel subplotonestro.

RECIPROKA SUBTENO INTER ARMEO KAJ POPOLO

Liu Ĉangĉun:

La revolucia tradicio de la Ĉina Popola Libera Armeo nun estas heredata de generacio al generacio. Ni prenas la edukadon de la revolucia tradicio kiel ĉefan lecionon por niaj trupoj. Ni konstante edukas la kadrojn kaj soldatojn per gloraj faroj de revoluciaj antaŭuloj, por ke ĉiu membro de nia regimento estu fidela al la popolo kaj la Partio, konscie defendu la popolajn interesojn kaj kontribuu sian forton al la plifirmigo de la proletara diktaturo en la periodo de la socialisma revoluciaĉo kaj la socialisma konstruado.

Ĉeng Ŝoukĵuan:

La estroj de la regimento ofte rakontas al ni pri revoluciaj antaŭuloj, kio vere edukis nin.

Ni nepre lernos de ili la noblan spiriton kaj sincere servos al la popolo. Kamarado Vang Ŝuangfu, antaŭa vicestro de nia kompanio, estas elstara ekzemplo en protekto al la amasoj.

Estis septembro de 1970. Nia kompanio estis subtenanta maldekstrajn revoluciajn amasojn en iu fabriko de antaŭfaritaj cementaĵoj. Iun posttagmezon, kiam kamarado Vang Ŝuangfu iris al laboro, li vidis, ke dekelkaj laboristoj pene puŝas rubandan transportilon. Li tuj alrapidis por doni helpon. Sed akcidento okazis: Falis de la akso la maldekstra rado de la transportilo pro defalo de la stifto kaj la transportilo tuj kliniĝis al kamarado Vang Ŝuangfu. Li subtenis per la tuta forto la pezegan transportilon per la manoj kaj la ŝultro kaj laŭte kriis: "Tuj diskuru!" La 18 laboristoj eldanĝeriĝis, sed kamarado Vang Ŝuangfu estis subpremita de la transportilo. Li svenis pro rompiĝo de la pelvo.

Tuj la tuta fabriko informiĝis pri la akcidento. Multaj laboristoj ploris kaj iuj tutan tagon ne manĝis pro ĉagreno. Laboristoj laŭdis, ke kamarado Vang Ŝuangfu estas vera bravulo, kiu en danĝero konsideris nur pri la laboristoj, sed ne pri si mem.

Vang Ŝuangfu:

Inter mia faro kaj la postulo de la Partio, inter mia faro kaj la faroj de la revoluciaj antaŭuloj de nia regimento, troviĝas ankoraŭ longa distanco. Mi multfoje pririgardis la Ekspozicion pri la Regimenta Historio kaj aŭskultis rakontadon de gvidantoj pri la glora tradicio de nia regimento, kio multe edukis min. La rakonto pri la dek bravuloj de Maŝi-monto ĉiuforte draste impresis kaj profunde emociis min.

Ju Hijun:

La dek bravuloj de Maŝi-monto estas ĉiam memorindaj kaj lernindaj por ni.

En vintro de 1942, por savi sin el fiasko, japanaj agresantoj kolektis pli ol dekmil soldatojn por praktiki al la armeanoj kaj popolanoj de la bazo en orienta Ŝandong kruelan "trolan balaadon" kaj politikon "formortigi, forbruligi kaj forrabi". Tiam miloj da virinoj, infanoj kaj maljunuloj estis ĉirkaŭataj de la fajroreto.

Ankaŭ Vang Dianjuan, estro de la 6-a subploton de la 7-a kompanio, kaj 9 soldatoj sub lia gvido estis sieĝitaj de la malamikoj, post kiam ili foreskortis gvidantojn. Ili kaj la miloj da vilaĝanoj estis sieĝitaj ĉe Maŝi-monto. La soldatoj flame indigniĝis pensante, ke post sunleviĝo la amasoj

estos buĉitaj de la malamikoj. La subplotonestro ĵuris kun la soldatoj: "Ni estas soldatoj de la Okavoja Armeo edukitaj de Prezidanto Maŭ. Ni nepre devas savi la amasojn, eĉ se antaŭ ni estus glavmonto aŭ fajra maro." En mallumo la soldatoj faris sturmon al la malamikoj, sukcesis breĉi la sieĝon kaj elsavis grandan nombron da popolanoj, sed la breĉo rapide estis ŝtopita de la malamikoj. Aŭdinte la kriadon de la amasoj sieĝataj de la malamikoj, la soldatoj volis refoje ensturmi. Tiam unu el ili jam martiriĝis. La sieĝa cirklo de la malamikoj pli kaj pli malgrandiĝis. Vang Dianjuan klare sciis, ke ili ne povos eliri el la sieĝo se ili refoje ensturmos. Sed por savi la amasojn, li kaj la soldatoj refoje entrudiĝis kiel tigroj en la fajroretan. Ankaŭ la sieĝataj amasoj prenis ŝtonojn, stangojn kaj luktadis kune kun la soldatoj kontraŭ la malamikoj. Alia nombro de la popolanoj sukcesis saviĝi sub la ŝirmo de la soldatoj. Baldaŭ heliĝis. La malamikoj daŭre malgrandigas la sieĝan cirklon. Fariĝis pli kaj pli danĝere. La subplotonestro ordonis: "Kamaradoj, ni tiru la atenton de la malamikoj al ni por ke la amasoj povu saviĝi." La soldatoj tuj faris kelkajn pafojn al la malamikoj kaj kuregis sur la monton. Vidinte ke la soldatoj de la Okavoja Armeo forkuris, la japanaj diabloj tuj lasis la amasojn kaj persekutis niajn soldatojn. La soldatoj kaj kuris kaj pafis, kaj kondukis la malamikojn sur la monton. Tiam tria nombro de la popolanoj sukcesis forkuri. Restis nur 4 soldatoj kaj 2 grenadoj. La soldatoj rompis la pafilojn kaj la subplotonestro ĵetis unu grenadon al la malamikoj kaj tenis la alian antaŭ sia brusto. La ceteraj tri soldatoj strikte ĉirkaŭis Vang Dianjuan. "Pum", la kvar bravuloj martiriĝis, tamen la amasoj estis elsavitaj.

Post la Liberiĝo la tiea popolo starigis monumenton por la dek bravuloj de Maŝi-monto. Ĉiun printempon loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo de dekoj aŭ centoj da kilometroj venas al la tombo por funebri pri ili.

Feng Ŝucaj:

En iu fabriko de ilmaŝinaj akcesoraĵoj, kie ni estis subtenantaj maldekstrajn revoluciajn amasojn, estas laboristoj elsavitaj de la dek bravuloj de Maŝi-monto. Ankaŭ ili rakontis al ni pri la heroaĵo.

Ju Hijun:

Kamarado Vang Ŝuangfu heredis tiun gloran tradicion de la revoluciaj antaŭuloj. Pro lia heroaĵo, la partia komitato de la trupo honoris lin per duagrada merito kaj alvokis la tutan trupon lerni de li.

Vang Ŝuangfu:

Ni estas soldatoj el la popolo. La Partio kaj Prezidanto Maŭ konstante edukas nin, ke la popolaj interesoj superas ĉion. Savi popolanojn el morta danĝero estas mia devo. Mi faris nur bagatelon, sed la Partio kaj la popolo donis al mi gigantan kuraĝigon kaj zorgon. Direktate de gvidantoj, la higienaj laborantoj faris ĉion por savi min. Mi kuŝis en hospitalo 5 monatojn kaj ĉiutage min vizitis kaj konataj laboristoj kaj nekonataj kamaradoj. Ili donis al mi kuraĝon kaj forton por venki la malsanon.

Feng Ŝucaj:

Senlima estas la amo de la popolo al ni.

En majo de 1971, ni iris al la fabriko de ilmaŝinaj akcesoraĵoj por subteni maldekstrajn revoluciajn amasojn. Antaŭ aliro ni jam informiĝis, ke la fabriko batalis kune kun ni en la militaj jaroj. Tio aparte ĝojigis nin.

Liu Ĉangĉun:

Estas vere ke en la periodo de la Kontraŭjapa-

na Rezistmilito la fabriko jam estis kunbatalanto de nia regimento. Tiam ĝi estis fabriko de armiloj en orienta Ŝandong. Multaj el la armiloj tiam uzataj de nia regimento estis ĝiaj produktaĵoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĝi ekproduktis ilmaŝinajn akcesoraĵojn. Kamarado Zoŭ Fengki, bredisto de la fabriko, iam estis soldato de nia regimento. Pro tio la rilato inter ni kaj la fabriko estas aparte intima. Eksciinte nian iron, la partia komitato de la fabriko speciale okazigis kunvenon por konsiliĝi, kiel bonvenigi la soldatojn el la popolo.

Feng Ŝucaj:

Kiam ni atingis la fabrikon, ĉio estis jam en preteco. En la sekvinta tago venis al ni multe de laboristoj kaj iliaj familianoj. Ili rigardis nin kiel siajn familianojn kaj forprenis niajn malpurajn vestojn por lavi. Poste, ĉiun dimanĉon ili venis al ni por tion fari. La komplezo estas neniel rifuzebla. Ankaŭ la ŝtrumpetoj nun de mi portataj estas flikitaj de ili.

Regimenta politika komisaro Vang Hiangji studas problemon de produkto kune kun laboristoj dum lia subteno al la maldekstruloj en iu ŝpinteksejo.



Pri ŝtrumpetoj ni povas mencii alian okazajon. Rekruto de nia dua subplotono forjetis paron da truej ŝtrumpetoj. Onklino Vej, edzino de laboristo de la fabriko, ĝin levis, lavis, fikis kaj redonis al ni. Ŝi rakontis al ni pri la bona tradicio de ŝparemo de la veteranaĵ armeanoj, kio multe edukis nin kaj emociis la rekruton ĝis larmoj.

Liu Ĉangĉun:

Onklino Vej nun havas la aĝon de 53-jaroj. En la pasinteco ŝi instigis virinojn fari ŝuojn por la armeo kaj kuraĝigis sian edzon partopreni en la popola armeo. Ŝi estis modelo de subteno al armeo.

La maljunaj laboristoj zorgas la soldatojn ne nur en la vivo, sed ankaŭ en ilia politika progreso. Ili rakontis al la soldatoj historiojn de la fabriko, de iliaj familioj, rakontis pri la intima rilato inter la armeo kaj la popolo en la malfacilaj jaroj. En tiu jaro la soldatoj de la 1-a kompanio akiris rapidan progreson en politika konscio.

Feng Ŝucaj:

La progreso estas neapartigebla disde la helpo kaj edukado de la amasoj. La tieaj amasoj ne konas niajn junajn soldatojn venintajn de diversaj lokoj de la lando, tamen ili zorgas kaj amas nin kiel siajn filojn nur pro tio ke ni estas soldatoj de la popola armeo gvidata de Prezidanto Maŭ.

Kion do ni devis fari? La soldatoj decidis fari bonojn por la laboristoj kaj kontribui al la konstruado de la fabriko. Ĉiutage ni purigis la pli ol 20 necesejojn de la fabriko kaj la tutan fabrikon. La fabriko volis grandigi laborejojn kaj faris decidon laŭ la principo fari ĉion kun diligenteco kaj ŝparemo, ke laboristoj faru fundamenton post deĵoro. Por ke laboristoj povu pli multe produkti, ni prenis sur nin la taskon. Per dimanĉoj kaj intertempo en trejnado ni plenumis la taskon de 300 kubmetroj da teraĵo.

En tiu jaro, inter ni kaj la vastaj laboristaj amasoj stariĝis profunda amikeco. Je nia forlaso de la fabriko, laboristoj kaj iliaj familianoj ĉiuj venis por adiaŭi nin.

Vang Ŝuangfu:

Ankaŭ multaj homoj venis adiaŭi nin, kiam nia higiena grupo volis forlasi ilin. Du avinoj kun la aĝo de pli ol 80 jaroj alvenis kun irbastono. Premante al ni la manojn la avinoj diris: "Ho knaboj, vi ofte kuracis al ni malsanon. Post via foriro mi sentos kvazaŭ mankas unu membro el mia familio."

Liu Ĉangĉun:

Multajn jarojn la higiena grupo persistas pri la bona tradicio. En malpli ol unu jaro kaj duono, ĝi kuracis 3,700 personfojojn. Kiam ĝi revenis al la kazerno, ĝi daŭre iras al la ĉirkaŭaj vilaĝoj por kuraci malsanojn al kamparanoj kaj eduki por la brigadoj iliajn proprajn kuracistojn.

Kien ajn niaj trupoj venas, tie ili helpas la amasojn. Akvoportado, kortopurigado, printempa semado aŭ aŭtuna rikolto, putofosado... ĉio ĉi tio estas ofte farata konscie de kadroj kaj soldatoj.

KONSCIE OBSERVI AMASAN DISCIPLINON

Ju Hijun:

En 1949, antaŭ ol la trupoj militiris trans Jangzi-riveron, superaj organizoj unue lasis nin koni urbajn disciplinojn, kies ĉefa enhavo estas, ke ĉiu komandanto kaj soldato rigore observu la tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atentigo, kaj modele praktiku la urbajn politikojn de nia partio.

La Ŝanhaja Kampanjo finiĝis en pluveta nokto. Por ne ĝeni la urbanojn, la soldatoj irintaj en la urbon dormis sur la stratoj, ankaŭ la komandantoj estis establitaj sur stratoj. Niaj soldatoj dormis sur humidaj stratoj kun grensako kiel kapkuseno. La ŝanhajaj popolanoj estis korduŝitaj kaj donis al ni akvon kaj litaĵojn, sed ni ĝentile rifuzis. Iuj urbanoj persiste invitis nin dormi en iliaj domoj. Ili diris: "Vi tute laciĝis kaj ni preferas ne dormi por cedi la litojn al vi." Sed neniu el ni iris en la domojn de urbanoj kaj ĉiuj konscie observis la disciplinojn.

Liu Ĉangĉun:


Tia konduto havis tiam grandan influon. Iuj urbanoj larmis vidinte soldatojn de ĈPLA dormantaj sur la stratoj. Ni ĉiam prenas tiun aferon kiel bonan materialon por eduki soldatojn.

Ĉeng Ŝoukĵuan:

Ni ankaŭ diligente lernas de la ekzemploj de niaj antaŭuloj.

En februaro de la pasinta jaro, nia dua artileria kompanio estis plenumanta ian taskon kaj provizore loĝis en Sandaŭgoŭ-brigado. La brigado estas malgranda kaj ne havas vakajn ĉambrojn. La vilaĝanoj volis cedi siajn ĉambrojn al la soldatoj, sed la lastaj neniel konsentis. La soldatoj de la 9-a subplotono loĝiĝis en iun terkabanon kun tri muroj kaj grundo tre humida. Ili ŝirmis ĝin per kontraŭpluvaj toloj kaj tie tranoktis. En la sekvinta tago ili meminciate masonis la kvaran muron por la mastro de la kabano.

La armeanoj kaj milicianoj en trejnado



Alifoje, ni kampadis ĉe Giaĝuang-vilaĝo. Koko de iu vilaĝano saltis en forĵetajujon de nia kuirejo kaj dronis. Kuiristo tuj demandis, de kiu estis la koko, kaj pretis kompensi. Sed neniu konfesis al li. Poste de iu knabo li informiĝis, ke la koko apartenis al avo Gia. Ni donis al la avo unu juanon laŭ merkata prezo. Sed la avo diris: “La koko mem dronis, kial do vi kompensu?!” Ni diris: “La koko dronis pro tio, ke ni ne tegis la ujon per kovrilo. Ni devas kompensi.” Sed la maljunulo neniel konsentis akcepti. Ni sciis, ke lia filo servas en nia armeo kaj ni tion profitis: “Se via filo estus en tia kazo, ankaŭ li tiel kondukus. La disciplinoj de la liberiga armeo ellaboritaj de Prezidanto Maŭ postulas ke ni tiel kondukutu.” Nur tiam la maljunulo akceptis la monon.

Ĉen Ĉungeng:

Multaj ekzemploj pri konscia observo de disciplinoj

fare de niaj soldatoj estas citeblaj. Foje, kiam la 3-a subplotono de la 9-a kompanio loĝis en iu vilaĝo, okazis nokte en la vilaĝo amasa kunveno. Iu soldato cedis sidlokon al kamparano kaj preteratente rompis lian lampocilindron. En la sekvinta tago la soldato piediris 10 kilometrojn por aĉeti lampocilindron. Li revenis kun la lampocilindro en sia sako. Sed ĝi rompiĝis kontraŭ la por-do. Li do refoje iris kaj aĉetis lampocilindron. La kamparano diris al li, ke lia lampocilindro estis malnova kaj havis fendon, kaj la soldato ne devas kompensi. Tial li akceptis la lampocilindron kaj volis pagi la koston al la soldato.

Sed la soldato neniel konsentis akcepti la monon kaj la kamparano la lampocilindron. Ili longe disputis kaj fine la soldato konvinkis la kamparanon per ekspliko de la “tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atentigo”.

Liu Ĉangĉun:

Prave. Disciplino estas garantio por praktiko de linio. Sen rigora disciplino ni ne povus akiri venkon kaj la amasoj ne subtenus nin. Kompensi ĉu lampocilindron, ĉu kokon aŭ ion alian, ŝajne estas bagatelo, tamen tio montras la naturon de la popola armeo kaj ekzamenas, ĉu ni heredas kaj disvolvas la revolucionan tradicion. Neniel ni devas rigardi tion kiel bagatelon!

SINLERTIGO PER MILITA TEKNIKO

Ĉen Ĉungeng:

La kaŭzo, ke nia armeo povis venki la malamikojn en la pasintaj revoluciaj militoj, kuŝas en tio ke ili havis altan militan teknikon, krom la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj la alta politika konscio de la revoluciaj antaŭuloj. En la hodiaŭa paca situacio, firme tenante la instruon de Prezidanto Maŭ **“La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas batalanta trupo”**, ni rigore postulas kaj trejnas la trupojn por altigi ĝian militan kvaliton. Ni ĉiam estas singardemaj kaj pretaj ekstermi aŭdace entrudigontajn malamikojn por defendi nian socialisman patrolandon.

Man Fuŝuj:

Senspertaj pri batalo ni junaj batalantoj ne bone konis la gravecon de milita tekniko. En la somero

Ili laboras por komunumanoj.



de la pasinta jaro nia kompanio sin ekzercis en nokto. Tuj rekrutoj pensis, ke en la estonteco oni luktos per modernaj armiloj, ĉu estos necese ke ni infanterianoj rampos en nokto? La kompaniestro propagandis al ni la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri nokta militado kaj la gloran tradicion de la kompanio ke ĝi per nokta surprizatako gajnis multajn venkojn en la antaŭaj revoluciaj militoj, kio multe altigis nian komprenon pri la graveco de nokta surprizatako en ekstermo de malamikoj kaj pliaktivigis nin en la nokta trejnado.

Kiam ni ekzercis nin en nokta observado kaj subaŭskultado, en la komenco ni ofte estigis bruon rampante sur montvojetoj, kaj pro tio ni ofte tro frue nin malkaŝis antaŭ la malproksimaj “malamikoj”. La kompaniestro foje-refoje montris al ni sur vojeto herboza kiel oni devas agi malgraŭ mordado de moskitoj kaj pikado de dornaĵoj. Ankaŭ ni peneme nin ekzercadis. Poste ni faris tian ekzercon: unu subplotono gardas sur montpinto dum alia plotono tute armita ŝtele proksimiĝas al ĝi. Kiam la atakanta plotono jam atingis lokon kvin metrojn fore de la gardanta subplotono, la lasta ankoraŭ ne rimarkis ĝin. Nia kompanio bone plenumis la taskon de nokta trejnado en cent tagoj.

Ĝu Licaj:

Mi rekrutiĝis en la kuranta jaro. Antaŭ tio mi estis komunumano kaj delonge mi jam havas deziron aniĝi al la armeo por defendi nian patron. Mi tre ĝojis kiam mia deziro estis efektivigita. Sed en la unuaj tagoj mi jam tediĝis je longa kuŝa pafcelado. Kiam la subplotonestro venis por kontroli, mi celadis por momento. Tuj post lia foriro mi jam ĉesigis tion kaj rigardis jen tien jen ĉi tien. Je la unua ekzameno neniu mia pafotrafis la celtabulon. La subplotonestro kritikis min: “Por kio vi aniĝis al la armeo? Kia soldato vi estas, se vi eĉ ne scipovas pafi?” Aŭdinte tion mi ekploris.

Poste la subplotonestro interparolis kun mi kaj demandis: “Ĉu vi ne volas defendi la patrolandon?” “Jes!” mi respondis. “Kiamaniere vi ĝin defendos?” Vidinte ke mi ne povis respondi, la subplotonestro diris multon pri la graveco de ekzercado kaj lernis kune kun mi la verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. Tiam mi pli bone komprenis, ke la membroj de la Liberiga Armeo estas venintaj el la popolo kaj ili devas defendi la interesojn de la popolo, defendi la patrolandon. Por tio ili devas havigi al si lertan militan teknikon. Ankaŭ veteranaj batalantoj ofte diris

*Ili rikoltas toma-
tojn sur memeks-
pluatita tero.*



al mi: “Ni povos gajni venkojn en milito, se ni pli multe ŝvitas en ordinara ekzercado.”

Profundiĝis mia kompreno kaj serioziĝis mia ekzercado. Post certa tempo da penado mi trovis leĝon de pafado kaj gajnis brilan sukceson en la unua pafekzameno.

Ju Hijun:

Juna Ĝu estas lerta en pafado. En la unua paf-ekzerco li faris 11 pafojn kaj ĉiu trafis la celtabulon. Li gajnis sume 93 cirklojn, meznombro po pli ol 8 cirklojn. En nia regimento estas multaj tiaj batalantoj kia Juna Ĝu, kiuj energie lertigis sin en milita tekniko.

Ĉen Ĉungeng:

Lastatempe nia bataliono faris ekzamenojn de pafado kaj grenadjetado. Ĉiuj soldatoj de nia bataliono trapasis la unuan kaj la duan pafekzercojn kun brilaj sukcesoj. La meznombra distanco de ilia grenadjetado atingis pli ol 40 metrojn. Tiaj sukcesoj estis akiritaj de la soldatoj nur post pena ekzercado.

Luo Hjuguj, rekruto de la sepa subplotono de la naŭa kompanio, estis malforta. En la dua pafekzerco oni devis pafi sen apogilo. Je la

komenco kiam li tenis la pafilon por celado, liaj streĉitaj manoj tremis. De tiam ĉiutage li tenadis pafilon aŭ brikojn por havigi al sia brako pli multe da forto. Tiamaniere li povis teni poste du aŭ tri brikojn por kvin, dudek, kaj fine 60 minutoj. Kaj li akiris bonan sukceson en la ekzameno de la dua pafekzerco.

Ju Hijun:

Kiel solida apogilo de la proletara diktaturo, la Ĉina Popola Liberiga Armeo devas havi altan politikan konscion kaj perfektan militan teknikon por defendi la patrolandon. Nun jam leviĝis en nia regimento arda tajdo de trejnado, en kiu oficiroj instruas soldatojn, soldatoj oficirojn kaj soldatoj soldatojn. Dank' al tio rimarkinde kreskis la militaj kvalitoj de la trupo. La rezultoj de la ekzameno farita de supera instanco montris, ke nia regimento akiris bonajn sukcesojn en trejnado tiel en taktiko kiel en tekniko.

Observante la instruadon de Prezidanto Maŭ, ni devas daŭre marŝi antaŭen, ĉiam esti modestaj, singardemaj kaj liberaj de fiereco kaj malpacienco, kaj daŭre konservi kaj disvolvi la gloran tradicion de nia armeo por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Ĉiam Progresema Kompanio

— pri la “Bona Oka Kompanio sur Nankin-strato”

*Soldatoj de la kompanio en
patrolado sur Nankin-strato*



EN la granda lernejo — Ĉina Popola Liberiga Armeo troviĝas unu heroa kompanio, kiu ricevis gloran nomon de Bona Oka Kompanio sur Nankin-strato donitan de la Nacidefenda Ministerio de nia lando.

Antaŭ nelonge iu kadrino veturis de Pekino al Ŝanhajo por plenumi taskon. Je la foriro ŝia filino, kiu lernas en iu elementa lernejo, diris al ŝi: “Panjo, vi nepre iru al Nankin-strato kaj vizitu onklojn de la Bona Oka Kompanio post la atingo de Ŝanhajo. Multe rakontu al mi pri ili, post kiam vi revenos...”

Kial knabino de nia ĉefurbo havas al ĝi tiel profundan amon? Tion ni rakontu de la komenco.

MALLUKSA VIVADO SUR LUKSA STRATO

En la komenco de somero de 1949, nelonge post la liberiĝo de Ŝanhajo, la nuna oka kompanio de iu regimento de la Ŝanhaja Garnizono, kiu venis de kuglopluva batalkampoj al Ŝanhajo, komencis patroli sur la luksa Nankin-strato.

Antaŭ la Liberiĝo, ĉe Nankin-strato aktivis imperiistoj, kompradoraj kapitalistoj, grandaj komercistoj, riĉuloj, apaĉoj kaj ŝtelistoj, kaj inundiĝis malpuraj negocoj, diversaj friponaĵoj kaj aventuraj komplotoj. Post kiam la kompanio venis al Nankin-strato, klasaj malamikoj malice asertis, ke post nelonga tempo, ilin ni ŝimigos kaj putrigos. Tamen, la batalantoj de la kompanio firme tenas en sia koro la instrukcion de Prezidanto Maŭ Zedong “... por ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, prudentaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de malluksa vivado kaj penema luktado.” Ili ne perdis orientadon antaŭ “aroma vento” de klasaj malamikoj, daŭre tenas naturon de proletara armeo, mallukse vivas sur la luksa strato kaj ricevis subtenon kaj amon de popolamasoj.

En la komenco post la Liberiĝo, kvankam ne aŭdiĝis pafoj, tamen ankoraŭ ne ĉesis la klasa batalo. Foje, kiam batalantoj de la kompanio estis patrolantaj sur Nankin-strato, iu homo ĵetis el fenestro paketon da bankbiletoj al ili. La soldatoj indigne ilin piedforpuŝis. Alifoje, iu koketulino baris patrolantajn soldatojn kaj kroĉiĝis al ili senhonte, sed la soldatoj riproĉis ŝian konduton kaj ŝin forpelis. La soldatoj de la kompanio meritas la nomon de heroo ne nur en militkampoj, sed ankaŭ en batalo kontraŭ “sukertegitaj obusoj” de malamiko.

Ne proprigi al si alies perdaĵon estas bona tradicio de la oka kompanio. Kiam ili trovis iun ajn perdaĵon, ili ĉiam klopodis serĉi la perdinton aŭ donis ĝin al la policejo. Foje, proviantisto Ĝu Jingcaj trovis 130-juanan bilon kaj persone redonis ĝin al la perdinto. La maljuna perdinto emocie diris: “En la pasinteco kuomintangaj soldatoj rabis ĉion, kion ili vidis, sed nun vi redonis al mi la perdaĵon. Mi jam vivis pli ol sepdek jarojn, sed neniam vidis tiajn soldatojn kiaj vi. Vi vere estas bonaj batalantoj edukitaj de Prezidanto Maŭ.”

TRADICIO DE PENEMA LUKTADO

“Ĉiu revolucia batalanto devas ĉiamaniere malpezigi ŝarĝon de la Partio kaj popolo kaj kontribui pli multe.” La batalantoj de la kompanio ne nur tiel diras, sed ankaŭ tiel kondukas. Ĉiuj el ili havas sian kudrilan saketon kaj povas lerte fliki vestojn. Preskaŭ ĉiuj ellernis barbiran teknikon. Ili tondas harojn ne nur al si mem, sed ankaŭ al amasoj ĉirkaŭ la kazerno. Ili plektas sandalojn kaj surmetas ilin en patrolado, postenado...

La kompanio havas tradicion, ke en la bonveniga kunveno ĉiu rekruto devas ricevi tri “donacaĵojn”: paron da sandaloj, kudrilan saketon kaj memfaritajn kovertojn. La kompaniestro diris al ili: “Al ni ne mankas ŝuoj, sed ni ankoraŭ plektas sandalojn por heredi la gloran tradicion elkulturitan de Prezidanto Maŭ sur Gingsangmontaro kaj ĉiam marŝi antaŭen laŭ lia revolucia vojo.”

En la oka kompanio cirkulas multaj rakontoj pri laboremo, ŝparemo kaj penema batalo en malfaciloj. La ilkesto de la kompanio estas farita de malnova soldato Vu Jueŝeng el uzitaj tabuloj. Li per sia mono aĉetis segilon kaj najlojn kaj ofte riparis ŝtuparojn, benkojn kaj aliajn. En 1960, kiam Vu Jueŝeng demobiliziĝis, li transdonis la ilkeston al soldato de sia subploto Li Zugen dirante:



Soldatoj helpas laboristojn de iu legomejo en puŝado de ĉaro.

“Nia lando estas ankoraŭ relative malriĉa, ĝi estas granda kaj la loĝantoj multaj. Se ĉiu ŝparus cendon, do la akumulita nombro estus granda. Por ke ĝi riĉiĝu, ni devas esti ŝparemaj.” Transpreninte la ilkeston, Li Zugen, same kiel Vu Jueŝeng, ofte riparas sitelojn kaj sterkan ĉareton. Li ĉiam estas okupata. Krome, li aldonis novajn ilojn al la kesto kaj prenis al si pliajn laborojn. Tial soldatoj nomas lin “laboremulo”. Nun la ilkesto estas jam transdonita al la deka soldato Ĝang Linhaj. Kien iras la kompanio, tien Ĝang Linhaj kaj liaj kamaradoj portas la stilon de laboremo, ŝparemo kaj penema batalo en malfaciloj.

HELPEMO

“La malfaciloj de la popolo ja estas la niaj kaj la feliĉo de la popolo ankaŭ la nia.” Sub direktado de tiu penso la batalantoj de la kompanio faris multajn bonaĵojn kaj ricevis multan laŭdon de la popolamasoj.

En 1959, informiĝinte, ke mortis familiano de batalanto Ĝou Ĝinlaj, estinta politika direktanto Liu Ĵenfu donis al li forpermeson kaj nombron da mono, por ke li revenu hejmen. Malgranda Ĝou emocie dankis gvidantojn pro la zorgo. Liu Ĵenfu diris: “Estas nenio! Ni ĉiuj estas revoluciaj kamaradoj. Kvankam ni estas ne sangfratoj, tamen klasaj fratoj. La malfacilo de unu el ni estas tiu de ni ĉiuj.” Kiel faras la kadroj, tiel faras la soldatoj. Nur pli ol du monatojn post sia aliĝo al la kompanio, iu soldato sciis, ke familio de alia soldato renkontis malfacilon en la vivo, li, kiel malnovaj soldatoj, kaŝe sendis al ĝi sian ŝpartitan monon per poŝto en la nomo de tiu soldato.

La kadroj kaj soldatoj de la kompanio ne nur zorgas, helpas kaj amas unu la alian kiel fratoj, sed ankaŭ heredas kaj disvolvas la gloran tradicion de nia armeo de amo al la popolo.

Nokton de iu jarfino laŭ la luna kalendaro, du patrolantaj batalantoj trovis plorantan knabon, kiu serĉas siajn gepatrojn. Ili tuj dorsportis la knabon al la kompania kazerno. La tempo jam estis post la unua horo de nokto. Politika direktanto Vang Ĝingven diris: “Hodiaŭ estas la jarfino, liaj gepatroj certe maltrankviliĝas. Ni devas rapide revenigi lin hejmen.” La knabo

nur memoris, ke lia domo troviĝas apud la amuzejo “Granda Mondo”, sed pli da detalo li ne sciis. Pluvetis. Vang Ĝingven kaj soldato trairis multajn stratetojn ĉirkaŭ la amuzejo dorsportante la knabon kaj finfine trovis lian domon. La gepatroj multe dankis ilin. Vang Ĝingven respondis: “Tio ja estas nia devo.” Kiam ili revenis al sia kazerno, jam estis tagiĝo.

NOVA PROVO, NOVA KONTRIBUO

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la kompanio spertis novan batalan provon kaj faris novan kontribuon.

En la komenco de la kultura revolucio, kun firma starpunkto kaj klara sinteno la kompanio decideme defendis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. En ĵurnaloj ili publikis pli ol 100 artikolojn por kritiki reakciajn verkojn kiel “De-oficigo de Haj Ĵuj” k. a. Kiam leviĝis la movado de la ruĝaj gvardioj, ili varme subtenis ilian revolucionan aktivadon. Post venka naskiĝo de la Revolucia Komitato de Ŝanhajo en la ŝtormo de la januara revolucio, la batalantoj de la kompanio patrolis tagnokte sur ambaŭ bordoj de Huangpu-rivero por defendi la nove naskitan Revolucionan Komitaton.

Soldatoj riparas ilojn por komunumanoj ĉirkaŭ ilia kazerno.



La politika direktanto de la kompanio rakontas al soldatoj pri la glora tradicio de penema lukto.



De somero de 1967 la kompanio akceptis la taskon subteni la vastajn maldekstrulajn amasojn. Unue ili venis al iu hemia fabriko. Laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ, intime unuiĝante kun laboristoj, ili rapide akcelis ĝian bonan situacion kaj post malpli ol 3 monatoj fondis Revolucionan Komitaton de la fabriko.

Aŭtunon de 1968, la kompanio iris al kelkdek mezaj kaj elementaj lernejoj por subteni revoluciajn instruistojn kaj lernantojn kaj plenumi instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la eduka revolucio kune kun la laboristaj propagandaj taĉmentoj. Tiam klasaj malamikoj malice diris: “Ĉu malkleruloj povus okupi la pozicion de eduko? Tio estas simpla revo de bufo pri engluto de cigno.” Vizaĝe al kalumnio kaj subfosado de la klasaj malamikoj,

batalantoj de la kompanio kaj la laboristaj propagandaj taĉmentoj gvidis instruistojn kaj lernantojn por fari atakon al la malamikoj kaj akiris venkojn unu post alia. Dume, ili transdonis al la lernejoj la laborstilon de laboremo, ŝparemo kaj penema batalo en malfaciloj. Iuj el ili flikis vestojn por lernantoj, aliaj tondis harojn al lernantoj kaj riparigis pordojn kaj fenestrojn de lernejoj, kaj triaj gvidis lernantojn en balaado de stratoj kaj laborado en fabrikoj kaj komunumoj. Sub ilia influo pli kaj pli altiĝis la kono de instruistoj kaj lernantoj pri fizika laboro kaj laboranta popolo. Tuj post kiam Prezidanto Maŭ faris alvokon “**Intelektaj gejunuloj iru al la kamparo**”, la diplomitoj de tiuj mezlernejoj konkure sin anoncis por fari revolucion en plej malfacila loko. En adiaŭa



PLI OL MILIONOJ DA PUTOJ POR PUMPMASIÑOJ EN NORDA ĈINIO

De oktobro de 1972 ĝis la fino de marto de la kuranta jaro, oni fosis 184,000 novajn putojn por pumpmaŝinoj kaj jam muntis maŝinojn al pli ol 110,000 el ili en la 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Norda Ĉinio. La nombro de la nove fositaj putoj superis tiun de ĉiu ajn alia jaro en la historio. Nun pli ol miliono da putoj por pumpmaŝinoj funkcias en Norda Ĉinio, tiel ke ili altigis la rezistan povon kontraŭ sekegeco kaj plibonigis la produktan kondiĉon de agrikulturo.

PLIPRODUKTO DE FUNGOJ

Dank' al disvastigo de nova kultura metodo Anhuj-provinco akiris rimarkindan pliprodukton de fungoj.

Fungo estas unu el la eksportataj lokaj produktaĵoj de nia lando. Multaj mont-regionoj de Anhuj abundaj je arboj kun varma pluvoza klimato konvenas al kulturo de fungoj. De post la Granda Proletara Kultura Revolucio, nombro da popolaj komunumoj aktive lernis progresintan sperton en kulturo de fungoj kaj produktis fungojn per diversaj lignoj. Dank' al apliko de la nova kultura metodo, la produkta periodo de fungo mallongiĝis de 3 jaroj ĝis 8 aŭ 10 monatoj. Ne nur la produktokvanto estas pli granda kaj la kvalito pli bona, sed ankaŭ solviĝis la kontraŭdiro inter kulturo de fungoj kaj disvolvo de forstokulturo. Dank' al plimultiĝo de la komunumoj kaj produktaj grupoj aplikantaj novan metodon en la pasinta jaro, la tuta provinco akiris riĉan rikolton de fungoj. La totala produktokvanto kreskis je 4.6-oblo kompare kun tiu de 1966. Nun ankaŭ en Pekino, Ŝanhajo, Siĉuan, Gianghi kaj aliaj lokoj oni disvastigas tiun novan metodon de kulturado de fungoj.



Memflikado de sia vesto

kunveno kamaradoj de la kompanio donacis al ili sandalojn kaj kudrilan saketon kaj kuraĝigis ilin peneme batali en malfaciloj kaj radikiĝi en landlima regiono. Tiuj gejunuloj diligente lernas agrikulturan teknikon, aktive laboras, sin hardas en malfaciloj kaj akiris sukcesojn sur la stepo de Interna Mongolio. Malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj intime nomas ilin "Bona Oka Kompanio sur Neĝŝtorma Stepo".

Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, la fizionomio de Nankin-strato, kiel aliaj lokoj de nia lando, fariĝis vicleplena kaj tute nova. Vidinte tion la kadroj kaj batalantoj de la kompanio tre ĝojas. Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "La liberiga armeo lernu de la popolo de la tuta lando", ili kondukis aktivadon de lerno de la popolo. Ili iris al fabrikoj, havenoj, kampoj kaj magazenoj por lerni de laboristoj kaj kamparanoj la revolucionan spiriton en socialisma konstruado kaj avangardajn farojn de modeloj, kaj daŭre marŝas antaŭen sur la revolucia vojo.



Membro de fabrika gvidantaro, laboristoj kaj teknikistoj kune ellaboras projekton.

Amasa Projektado de la Pekina Unua Ilmaŝina Fabriko

Por bone fari projektadon la Pekina Unua Ilmaŝina Fabriko prenas la vojon de "triflanka kombiniĝo" de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj. En la amasa projekta aktivado de la fabriko 40 laboristoj jam fariĝis projektistoj. Pli ol 86% el la teknikistoj estis postenigitaj en diversnivelajn administrajn branĉojn kaj projektajn grupojn de "triflanka kombiniĝo" de laborejoj. Gvidantoj de diversaj niveloj profundiĝis en praktikadon, intime rilatiĝis kun la amasoj kaj fariĝis antaŭirantoj en projektado de "triflanka kombiniĝo".

De post kiam la Pekina Unua Ilmaŝina Fabriko prenis la projektan vojon de "triflanka kombiniĝo", la fabriko senĉese elfaras novajn produktaĵojn mem projektitajn kaj plenumis projektadon de dudek kelkaj objektoj, inkluzive tiun de 5 grandaj ekipaĵoj. Nun la amasa projektado de "triflanka kombiniĝo" estas vaste kaj profunde disvolvata en la fabriko.



Unu el la desegnaj
kabinetoj de la fa-
briko


Teknikistoj diskutas pri projekto.





Inĝeniero (la dekstra) konsiliĝas kun laboristo pri Problemo en projektado.






Projektisto de laborista deveno


Teknikisto kaj laboristoj ekzamenas kvaliton de nove projektitaj maŝinpecoj.



Novaj produktaĵoj muntataj por esti transportataj







Frezmaŝino 5040 — frukto de projektado de “triflanka kombiniĝo”.

Reedukate de laboristoj, teknikisto instruas al junaj laboristoj teknikan teorion.





Lej Feng

Rakontoj pri Lej Feng

Vaste cirkulas en Ĉinio rakontoj pri la heroaĵoj de kamarado Lej Feng, kies firma proletara starpunkto, revolucia spirito de unueco inter siaj vortoj kaj agoj, senegoisma komunisma stilo kaj mortospita batalvolo de la proletaro estas ĉiam lernindaj por la ĉina popolo!

La Red.

SERVANTO DE LA POPOLO

“La vivo de homo havas limon, sed la servado al la popolo estas senlima, kaj mi nepre dediĉos mian limigitan vivon al la senlima servado al la popolo.”

Tio estas alta deziro de Lej Feng elmontrita en lia taglibro kaj poste bone efektivigita per liaj

agoj. Li kaptis ĉiun okazon por fari bonojn, dediĉante ĉiun momenton de sia vivo al la Partio kaj la popolo.

Iun tagon Lej Feng veturis per trajno de Fuŝun al Ŝenjang por plenumi taskon. Vidante ke en la vagono estas tro multaj pasaĝeroj, li tuj cedis sian sidlokon al maljunulo. Kaj rimarkinte ke la konduktoro estas en okupateco, li tuj helpis

lin balai la plankon, purigi te-tabletojn, porti varman akvon al pasaĝeroj kaj helpis virinojn porti infanojn, serĉis sidlokojn por grandaĝuloj kaj portis objektojn por pasaĝeroj kiuj devis elvagoniĝi.

“Kamarado, vi jam ŝvitegas pro penado! Venu por iom ripozi!” pasaĝeroj lin admonadis.

“Mi ne sentas lacon!” respondis Lej Feng kun rideto.

Lej Feng elvagoniĝis ĉe Ŝenjang por ŝanĝi trajnon. Kiam li iris el la stacidomo, li vidis, ke multaj homoj ĉirkaŭas mezaĝan virinon kun infano sur la dorso. Iu diris: “Serĉu ankoraŭfoje, eble vi mismetis ĝin.” Tiam alia atentigis: “Baldaŭ ekiros la trajno al Gilin, ni ĉiuj helpu ŝin serĉi.” Vidinte ke la virino ne trovis la perdaĵon post traserĉo de siaj ĉiuj poŝoj, Lej Feng iris al ŝi kaj demandis:

“Franjo, ĉu vi perdis la bileton?”

“Mi veturas de Ŝandong al Gilin por viziti mian edzon,” diris la virino, “kaj ne scias, kiam la bileto kaj mono perdiĝis.”

Lej Feng palpis sian poŝon kaj konsolis ŝin: “Franjo, ne maltrankviliĝu kaj iru kun mi.”

Ili kune iris al la biletejo. Lej Feng aĉetis bileton per sia ŝparita mono kaj enmanigis ĝin al

la virino: “Franjo, ĝin prenu kaj tuj envagoniĝu, baldaŭ ekiros la trajno.”

Rigardante la bileton en la mano, la virino eklarmis de forta emocio kaj demandis: “Kio estas via nomo, fraĉjo? Kie vi laboras?”

“Eble ŝi volas redoni al mi monon,” Lej Feng pensis kaj tuj respondis kun rideto: “Franjo, ne necesas demandi pri tio, mi estas soldato de ĈPLA kaj loĝas en Ĉinio.”

La virino kun plenkora ĝojo sin direktis al la enirejo de la stacidomo, plurfoje sin returnis por rigardi kaj danke mansignis al Lej Feng...

En nubozona vespero, kiam Lej Feng finpurigis sian aŭton, subite ekpluvis. Li rapide suraŭtiĝis kaj sternis kanvason por kovri la aŭton. Je kaplevo li vidis virinon malfacile irantan en pluvo, kun pakajo sur la dorso kaj du infanoj — unu en la sino kaj la alia tirata de ŝi mem per la mano. Lej Feng estis tre surprizita de tiu sceno kaj pensis: “Ĉu la infanoj ne malsaniĝos pro la pluvo!” Kovrinte la aŭton li tuj rapidis al la virino kaj sciigis post demando ke ŝi estas nomata Gi kaj revenis de Harbin post vizito al siaj parencoj.

“Ah, kamarado, la pluvego tiel furiozas ke mi perdis la orienton kaj mi jam ne scias kiun vojon mi devas iri!”



Lej Feng kudras litkovrilon por sia kunbatalanto.

Kiel eksterlerneja direktanto de junpioniraj organizoj, Lej Feng ofte edukis geknabojn per la glora tradicio de penema luktado en malfaciloj.



Lej Feng pensis: La virino ankoraŭ devas iri pli ol dek liojn por atingi la hejmon. Baldaŭ mallumiĝos kaj ankoraŭ pluas torente, ja estas malfacilege por tiu virino kun la pakaĵo kaj du infanoj iri la vojon glitigan kaj kotoplenan! Li reiris al sia subplotono, diris tion al siaj kamaradoj, tuj revenis kaj diris al la virino: “Franjo, mi akompanu vin.” Li surmetis sian pluvmantelon al la virino, ekprenis la pliaĝan infanon en la sinon kaj iris antaŭen en la pluvo. Rimarkinte ke la infano tremas de malvarmo, Lej Feng demetis sian uniformon kaj kovris ĝin per ĝi. Post du-hora malfacila paŝado ili fine atingis la hejmon de la virino. Rigardante Lej Feng la virino diris kun larmoj en la okuloj: “Kamarado, mi neniam forgesos vin por la tuta vivo!”

“Franjo,” diris Lej Feng, “ni armeanoj kaj polanoj estas samfamilianoj...”

La familianoj de la virino petadis ke Lej Feng tranoktu ĉe ili kaj foriru en la sekvonta mateno. Tamen li forlasis la domon kaj revenis al sia garnizonejo malgraŭ pluvo, konsiderante ke li devos plenumi transportan taskon per sia aŭto en la venonta tago.

Somere de la jaro 1961, Lej Feng iris laŭ ordono al Giamusi por plenumi ian taskon. La 3-an de aŭgusto li revenis trajne kaj kiel antaŭe donis hel-

pojn al pasaĝeroj. Liaj agoj tiris atenton de konduktorino juna Vang, kiu rememoris la heroaĵojn de Lej Feng raportitajn en ĵurnalo. Rigardante tiun junan soldaton kun grandaj okuloj ŝi demandis al si: “Ĉu li estas Lej Feng?” Ĝuste kiam ŝi volis aliri por informiĝi, la trajno atingis la stacion Bingiang. La juna soldato iris el la vagono kaj komencis ŝirmi kune kun la lokaj portistoj pakaĵojn kontraŭ la pluvo. Li suriris la trajnon nur kiam sonoris la signalo por ekveturo. Vidante lin malsekigita kun ŝuoj kotmakulitaj, juna Vang aliris demandante:

“Kamarado, kiel vi nomiĝas?”

“Por kio vi bezonas scii tion?” kontraŭdemandis Lej Feng ridante.

“Se mi ne eraris, vi estas ĝuste kamarado Lej Feng!”

“Ankaŭ Lej Feng estas ordinara...” Li modeste ridetis.

Juna Vang tuj sciigis tion al ĉefkonduktoro kaj aliaj kolegoj. Ĉiu el ili elpremis tempon por viziti lin kaj interŝanĝis kun la lasta sperton en lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj servado al la popolo. La trajno haltis ĉe la urbo Ŝenjang kaj ĉiuj pasaĝeroj iris for de la vagonaro. Sed Lej Feng forlasis ĝin nur post kiam li purigis ĝin kune kun la konduktoroj.

Lej Feng tiel faradis bonojn por la popolo ĉiutage, tial ĉiufoje kiam oni vidas homon kiu faris bonojn, ili nature rememoras Lej Feng...

KORA AMIKO DE INFANOJ

Laŭ varma peto de geknaboj kaj konfido de la partia filio Lej Feng fariĝis eksterlerneja direktanto de la pioniraj organizoj de la elementaj lernejoj de Gianŝe-strato kaj Benhi-strato en la urbo Fuŝun. Li opiniis, ke eduki geknabojn per revolucia ideologio por ke ili fariĝu daŭrigantoj de la komunisma afero estas la tasko de la tuta socio kaj ankaŭ lia neforpuŝebla devo. Li amis la naivajn infanojn kaj la lastaj same amis lin rigardante lin kiel sian intiman amikon.

Iutage ses lernantinoj de la Elementa Lernejo de Benhi-strato kaprompis pro malfacila aritmetika problemo. Ĝuste tiam Lej Feng venis kaj demandis, ĉu ili renkontis malfacilojn en plenumo de ekzercaj taskoj. Sed neniu el ili volis eldiri tion. Lej Feng diris al ili kun rideto: "Mi jam divenis, ke vi renkontis nesolveblan problemon, kaj tamen vi hontas demandi. Vi devas demandi pri tio kion vi ne komprenas!"

Kuraĝigate de Lej Feng ili fine eldiris la malfacilan problemon. Dank' al pacienca klarigo de Lej Feng ĉiuj jam komprenis ĝin escepte de la plej juna lernantino kun malpli forta komprena povo. Lej Feng aparte ŝin helpis per longa klarigado ĝis la lasta vere komprenis la problemon. Li ankaŭ ofte kontrolis iliajn postlecionajn ekzercojn kaj donis apartan helpon al tiuj kiuj lernis kun malfacilo. Lernanto de la tria klaso de la Elementa Lernejo de Gianŝe-strato lernis bone, tamen skribis malbele. Lej Feng instruis lin tenante lian manon ĝis la lasta kapablis skribi belajn ideografiaĵojn. Li kuraĝigis la lernanton:

"Aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ, **'diligente lernu kaj progresu kun ĉiu tago'** por servi en la estonteco al la popolo kaj la socialisma patrolando."

Lej Feng ofte instruis geknabojn ke ili bone unuiĝu. Du lernantinoj de la Elementa Lernejo de Benhi-strato estis intimaj amikoj, tamen inter ili, oni ne sciis, kial okazis malpacigo, tiel ke ili eĉ ne volis interŝanĝi vortojn je renkontiĝo. Kiam la instruisto sciigis tion al Lej Feng, tiu ĉi diris: "Mi interparolos kun ili."

Iun tagon la geknaboj planis porti sterkon al la lerneja kampo, sed mankis al ili kulerego por elĉerpi fekaĵon. La instruisto sendis la du mal-

akordiĝintojn al la kazerno por pruntepreni tion. Ili trovis Lej Feng, prunteprenis la ilon kaj foriris. Rimarkinte malharmonion ĉe la lernantinoj Lej Feng tuj vokis ilin. Li rigardis jen al tiu jen al la alia kaj demandis ilin ridetante:

"Laŭdire, vi kverelis lastatempe, ĉu vere?"

Ĉe tiuj vortoj ambaŭ knabinoj tuj ruĝiĝis kaj pensis en si: Kia hontindaĵo! De kie onklo Lej sciigis pri tio? Tiam ili devis konfesi la veron, ke ili malakordiĝis pro krajono kaj viŝgumo kaj ne havis konversacion jam dum unu semajno.

"Kiel malbone estas," diris Lej Feng, "ke kiel intimaj amikoj vi kverelis pro tia bagatelaĵo. Kiam vi plenkreskiĝos, vi devos kune konstrui la Patrion. Kiel vi povus bone kunlabori se vi de nun jam ignoras la gravecon de solidareco?"

La vortoj de Lej Feng tuŝis la koron de la knabinoj, ke ili pentis la kverelon. Sed ĉiu el ili hontis

Lej Feng kaj liaj kamaradoj interŝanĝas sian komprenon en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.



paroli la unua al la alia. Lej Feng jam legis en iliaj okuloj kion ili pensis kaj kaptis ilin je la manoj dirante: “Se vi havas deziron reamikiĝi, vi tuj manpremu unu kun la alia, ĉu bone?”

La du naivaj knabinoj ĵetis rigardon unu al la alia kaj iliaj manetoj firme kunpremiĝis antaŭ Lej Feng.

Matene de la Printempa Festo de 1961, tri lernantoj de la Elementa Lernejo de Gianŝe-strato elkuris sur straton allogate de bruoj de tamtamo kaj tamburo. Ili volis pririgardi *jango*-dancon. De malproksime ili vidis soldaton kun ŝovelilo en la mano kaj portvektu sur la ŝultro, ĉe kies ambaŭ ekstremitoj pendis du korboj. Alproksimiĝinte ili rekonis ke tiu estas onklo Lej Feng.

“Bonan Printempan Feston, onklo Lej!” La knaboj ĝoje levis la manojn por lin saluti.

“Bonan feston, amiketoj!” Lej Feng intime salutis ilin kaj poste demandis, “ĉu vi iras por rigardi *Jango*-dancon?”

La knaboj kapjesis kaj, rimarkinte ke en la korboj de Lej Feng jam troviĝas multe da fekaĵoj, diris kun miro:

“Je la Printempa Festo vi ankoraŭ kolektas fekaĵon!”

“La Festo estas oportuna por tio,” diris Lej Feng demetinte la portvekon de sur la ŝultro, “la Partio alvokis al ni energie disvolvi la agrikulturon, tial mi kolektas fekaĵon en la libertempo. Ja ankaŭ tio estas kontribuo al la agrikulturo.”

Aŭskultinte la vortojn de Lej Feng neniu el la knaboj volis iri por rigardi *Jango*-dancon. Unu jam forprenis la ŝovelilon de Lej Feng kaj alia volis porti liajn korbojn. Frapante lin sur la ŝultro Lej Feng demandis:

“Ĉu vi ne rigardos *jango*-dancon?”

“Ne! Ni kolektos kune kun vi fekaĵon por la popola komunumo.”

“Bone!” diris Lej Feng. “De infanaĝo vi devas havigi al vi la bonan moralon ami la kolektivon

Lej Feng kaj liaj kumbatalantoj kolektas cementon elfalintan.



kaj fizikan laboron por pli bone servi al la popolo post via plenkreskiĝo!”

Sub direktado de Lej Feng la knaboj trairis kelkajn lokojn en proksimo kaj baldaŭ jam plenis la korbojn kaj tiel ili pasigis la Printempan Feston signifplene.

Tiu afero rapide diskoniĝis tra la lernejo. Ĉiuj geknaboj prenis Lej Feng kiel sian ekzemplon kaj aktive partoprenis en sterko-kolektado je libera tempo kaj poste liveris la kolektitan sterkon al la najbara Liŝigaj-popolkomunumo.

Multaj estas la faroj de Lej Feng per kiuj li edukis geknabojn esti penemaj kaj vivi simple. Foje iu knabo nomata Ĝou venis al la kazerno por sin amuzi kaj vidis, ke Lej Feng flikas sian ŝtrumpon sidante ĉe la litrando kun klinita kapo. Kun miro li diris: “Onklo ĈPLA-ano ankaŭ scipovas fliki ŝtrumpon!” Precipe kiam li rimarkis la ŝtrumpon plenan je diverskoloraj flikaĵoj, li pli miris: “Ĉu ankorau uzebla kun tiel multaj flikaĵoj?”

Lej Feng sidigis la knabon apud si, kaj diris daŭrigante flikadon: “Eĉ tian ŝtrumpon ni ne havis en la malnova socio! Prezidanto Maŭ alvokis, ke ni vivu simplan kaj peneman vivon, ankaŭ vi devas lerni flikadon...”

“Ĉu facile lernebla?”

“Ne malfacile.” Lej Feng demonstris al li flikante. Post tio tiu knabo vere komencis prove

fliki. Kelkajn fojojn Lej Feng demandis lin, ĉu li jam ellernis tion. Li ĉiam diris skuante la kapon: “Je ĉiu provo mi pikis al mi la manon kaj ĝis nun mi ankoraŭ ne ellernis tion.” Post kelkaj pliaj tagoj kiam li renkontis Lej Feng sur strato, li demetis sian ŝuon, levis la piedon kaj diris kun granda ĝojo:


“Onklo Lej, vidu, mi jam scipovas fliki ŝtrumpon!”

“Bonege!” Lej Feng foje pririgardis la flikitan ŝtrumpon kaj laŭdis lin: “Lerte flikita kun densaj kudreroj.”

De tiam ne malmultaj geknaboj komencis fliki ŝtrumpon...

Lej Feng aparte atentigis la geknabojn pri disciplino. Kiam li informiĝis de instruisto, kiu klaso havas malbonan disciplinon, li donis al tiu pli multan helpon. Li edukis ilin per rakonto pri la granda batalanto Kiu Ŝaŭjun, kiu heroe oferis sian vivon rigore observante batakampan disciplinon por akiri la venkon. La geknaboj aŭskultis absorbite. Tuj post finiĝo de la rakontado iuj el ili esprimis sian decidemon, ke ili nepre bone observos la disciplinon dum leciona horo kaj pene lernos por esti bonaj lernantoj de Prezidanto Maŭ. Ankaŭ tiuj geknaboj kiuj antaŭe emis petoli dum leciono fariĝis disciplinemaj.

Lej Feng kulturis la novan generacion ĝuste kiel diligenta ĝardenisto atente fleganta plantidojn.



KOMPLETAJ FOSILIAJ SKELETOJ DE ANTIKVAJ ELEFANTOJ

Oni trovis en Huajjuan-gubernio de Anhuj-provinco fosiliojn de antikvaj elefantoj, bubaloj kaj dolĉakvaj moluskaj konkvoj, inter kiuj fosilioj de du kompletaj antikvaj elefantoj (*Paleoxopon namadicus*) estas bone konservitaj kaj restarigitaj. Tiaj kompletaj fosilioj de antikvaj elefantoj estas unuafoje trovitaj en nia lando.

Paleoxopon namadicus kun alteco de ĉ. 4 metroj estas pli granda ol la nuntempa

elefanto. Laŭ spertiza konstato, tia giganta elefanto vivis antaŭ ĉ. 300,000 jaroj. En la evolua historio de animaloj, tia elefanto similas al primitiva tipo de afrika elefanto. La verta parto de ĝia kranio estas relative plata ol tiu de azia elefanto aŭ mamuto. Ĝiaj mueldentoj montras lozanĝajn emajlajn ringojn sur la surfaco de la dentoj pro maĉado.

La kompletaj fosiliaj skeletoj de antikvaj elefantoj utilas al pli ĝusta kono pri la karaktero de tia elefanto kaj la geografia medio kaj klimato de la baseno de Huajhe-rivero en antikveco kaj ili estas gravaj materialoj por studo de paleontologio kaj geologio.

Por Plirapidigi la Socialisman Konstruadon

ŜANHAJO estas unu el niaj ĉefaj kaj malnovaj industriaj bazoj. La tieaj laboristoj ofte renkontas en sia produktado jenajn demandojn: “Ĉu pliprodukto estas ebla se malnovaj estas la ekipaĵoj?” “Ĉu pliprodukto bezonas pliajn laboristojn?” La fokuso de la demandoj estas kiel pli bone rapidigi la paŝon de socialisma konstruado.

Kun la disvolviĝo de la produktado, kontraŭdiro okazis inter la malnovaj ekipaĵoj, fabriksdomoj kaj teknikoj de iuj fabrikoj de Ŝanhajo kaj la bezono de ilia produktado. Iuj opiniis, ke pliprodukto bezonas pli multe da ekipaĵoj, fabriksdomoj kaj laboristoj. Oni kritikis tiun eraran penson opiniantes ke necese estas disvolvi kapitalan konstruadon,

tamen pliprodukto devas esti efektivigita ĉefe per liberigo de siaj ekzistantaj latentaj fortoj. Dum la lastaj jaroj la ŝanhajaj industriaj entreprenoj agis ĝuste tiamaniere. Utiligante la ekzistantan industrian bazon, la laboristoj iniciative kaj energie disvolvas teknikan renovigon kaj teknikan reformon, aplikas kaj disvastigas novajn teknikojn kaj novajn teknologiojn kaj altigas mekanikigon kaj aŭtomatigon por produkti multe, bonkvalite, multspece kaj je malalta kosto. Kompreneble oni devas fari grandan klopodon por pliigi unu procenton de la produktoj pro la ĉiam pli grandiganta baza nombro sekve de la jaro-post-jara kreskado de la totala produkta valoro de industrio. Sub direktado de la ĝenerala linio de socialisma

Laboristoj kaj oficistoj de la Sepa Tinkturejo de Ŝanhajo klopodas produkti novajn specojn por kontentigi bezonon de niaj kamparanoj kaj nacimalplimulto.



konstruado "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie" elmetitan de Prezidanto Maŭ, la ŝanhaja laboristaro kun la spirito de penema lukto en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj venkis diversajn malfacilojn kaj senĉese akiris novajn sukcesojn. Surbaze de ĉiujara kreskado, la totala produktovaloro de industrio en la unua trimestro de la kuranta jaro jam superis la plej altan nivelon de la sama periodo en la historio. La produktokvanto de ŝtalo kreskis je 30 procentoj, grandtipaj traktoroj kaj minejaj ekipaĵoj je unu-oblo, vaporaj turbinoj por elektraj stacioj, grandtipaj ekipaĵoj por forĝado kaj laminato kaj presaj maŝinoj je 50 procentoj, kemifibraj teksaĵoj kaj la ĉiutage bezonataj industriaĵoj kreskis en granda skalo, kompare kun tiuj en la sama periodo de la pasinta jaro.

La ŝanhajaj industriaĵaj entreprenoj trovis en sia praktikado gravan vojon por disvolvi produkton, nome disvolvi amasajn teknikajn renovigon kaj reformon por liberigi la ekzistantajn produktajn latentajn fortojn de fabrikoj. Nemalmultaj entreprenoj ellaboris planojn de teknikaj renovigo kaj

Angulo de la Ŝanhaja Traktora Fabriko




reformo konformajn al siaj apartaj bezonoj, kiuj plejparte estas kune ellaboritaj de kadroj kaj laboristoj post enketado kaj diskutado en fabrikoj kaj laborejoj kaj estas efektivegeblaj. Kiel tipan ekzemplon ni prenu la Ŝanhajan Maŝinan Fabrikon Dalong, kiu havas historion de 70 jaroj kaj transformis sian fizionomion en teknika renovigo kaj teknika reformo. Antaŭ la Liberiĝo, tiu fabriko povis nur ripari maŝinpartojn de malgrandaj vaporŝipoj kaj produkti kelkajn simplajn maŝinojn por ŝpinteksado, dum nun ĝi jam fariĝis granda fabriko kapabla produkti multspecajn mekanikajn ekipaĵojn. Ĝia totala produkta valoro de la pasinta jaro jam estis 23-oblo de tiu de 1949. La kaŭzo kuŝas en tio, ke ĝi iom pliigis la novajn ekipaĵojn kaj aplikis novajn teknologiojn kaj teknikojn, kaj samtempe la laboristoj kun revolucia spirito faris teknikan reformon al la antaŭaj ekipaĵoj kaj senĉese altigis ilian kapablon.

La plejparto de ekipaĵoj de la dua metal-pri-laborejo de la fabriko estis fabrikita en la lasta periodo de la 19-a jarcento kaj komenca periodo de la 20-a jarcento. En la pasinteco, ĉiu laboristo povis prilabori nur 400 aksojn de ĉenero en unu deĵoro per tornado, tranĉado kaj aliaj procedoj. En la kultura revolucio, la laboristoj transformis malnovan tornilon en premformadan maŝinon, per kiu oni malmultigis la procedojn, anstataŭigis manlaboradon kaj tiel plialtigis la produktivon je 29-oblo. Nun ĝi jam povas fabriki per siaj reformitaj ekipaĵoj 2500-tunan modloforĝilon, globtornilon kaj aliajn kompletajn, grandtipajn kaj precizajn produktaĵojn.

Malnova estas la ŝpinteksa industrio de Ŝanhajo. Dum la lastaj jaroj oni faris sinsekve ampleksan reformon al maŝinoj por purigo de kotonon, kardado, dika fadeno, fadeno kaj teksado. En la pasinta jaro, amasoj koncentris siajn fortojn por fari per transformado larĝaŝtofajn teksmaŝinojn, kaj fabrikis altgradan ordigan ekipaĵon kaj trikotajn maŝinojn por supervestoj, tiel ke la larĝaŝtofaj teksmaŝinoj en ĉiuj fabrikoj plimultiĝis je 1.5-oblo, varmfiksaj maŝinoj je unu-oblo, trikotaj maŝinoj por supervestoj je 10-oblo kaj sekve ankaŭ la produktokvanto de diversaj altklasaj kaj mezklasaj teksaĵoj kreskis relative rapide.

Ĉie oni povas vidi specialajn ekipaĵojn elpensitajn kaj fabrikitajn de la ŝanhajaj laboristoj mem por anstataŭi la malnovajn ekipaĵojn nekonformajn al la bezono de produktado. Tiuj novaj ekipaĵoj kun bonaĵoj de malnovaj ekipaĵoj kaj novaj kreaĵoj de laboristoj havas relative grandan avantaĝon.



Laboristoj de la dua Bessemer-forna laborejo de la Ŝanhaja Unua Ferŝtala Fabriko muldas ingotojn.

La traktoraj kaj aŭtaj fabrikoj de Ŝanhajo havis en la pasinteco nur malnovajn ekipaĵojn kaj simplajn fabriksdomojn. Ekde 1971, tiuj fabrikoj mobilizis laboristajn amasojn por fabriki specialajn ekipaĵojn. Kaj dank' al la kunlaborado de ĉiuj fabrikoj de la samaj industriaj branĉoj dum du jaroj, pli ol 2,100 specialaj ilmaŝinoj estis fabrikitaj, 59 produktaj linioj inkluzive de tiuj de fandado, galvanizado, mekanika prilaborado, muntado k.a. estis konstruitaj, tiel ke multe plialtiĝis la produkta povo.

La ŝanhajaj laboristoj ĉiurimede liberigas latentajn fortojn kaj trovis multajn bonajn metodojn por pliprodukti. Iuj fabrikoj, persistante ĉe la principo de ŝparema administrado, atingis multajn sukcesojn per malmulta mono; multaj fabrikoj sinteze utiligas senutilajn likvaĵojn, gason kaj skorian, tiel ke krudaj materialoj estis ŝparitaj, la produkto pliiĝita kaj la produktokosto malaltigita. Kaj samtempe tio ankaŭ plibonigis la higienon de la urbo kaj garantias sanon de la popolanoj. En la Ŝanhaja Unua Fera-ŝtala Fabriko cirkulas rakonto ke konkuras kun tempo la laboristoj de la dua Bessemer-forna laborejo, kiun iam inspektis


Prezidanto Maŭ. Ĝiaj laboristoj mallongigis la afinacian periodon je unu minuto, tio signifas ke ĉiu forno povas doni unu ekstran fornon da ŝtalo por deĵoro. Por elŝpari unu minuton oni devas preni specimenon, fari breĉon, elfluigi ŝtallikvon kaj fini aliajn tri laborojn en ses minutoj. La kvin aŭ ses laboristoj, kiuj faras respektive tiujn laborojn, sin ekzercis en manipulado antaŭ kaj post sia laboro. Laboristoj de muldado kaj ekzamenado klopodis simpligi la laborprocedon de muldado de ŝtalingotoj. Fine ili elŝparis la unu karan minuton. En la jaro 1972, la ŝtala produktokvanto de la laborejo kreskis je 10% ol tiu de 1971, kaj en la unua trimestro de la kuranta jaro je 13.3% ol tiu de la sama periodo de 1972.

Observante la spiriton de la ĝenerala linio por socialisma konstruado de nia lando, la laboristoj klopodas ne nur produkti diversajn produktaĵojn pli multe sed ankaŭ bonkvalite. Kun la spirito kuraĝi pensi kaj agi kaj kun serioza scienca sinteno, ili kreive laboradas. En diversaj fabrikoj ĝenerale fondiĝis grupo el laboristoj, kadroj kaj teknikistoj por venki teknikajn malfacilojn. Ili diligente lernas progresintajn teknikojn kaj aktive adoptas



Kontrolistoj de la Ŝanhaja Fabriko de Brakhorloĝoj ekzamenas la kvaliton de brakhorloĝoj.

novajn teknikojn kaj teknologiojn konformajn al la konkretaj kondiĉoj de nia lando. La persistemo de la laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Brakhorloĝoj en senĉesa plibonigado de la kvalito de siaj produktaĵoj estas laŭdata kaj lernata. En la jaro 1972, la produktokvanto de brakhorloĝoj rapide leviĝis ĝis 2,500,000, t.e. 1.7-oblo de tiu de 1966. Ankaŭ la kvalito de ĝiaj produktaĵoj leviĝis je unu klaso. En la unua trimestro de la kuranta jaro ĝia produktokvanto kreskis je 10% ol tiu de 1972, kaj la ĝenerala normeco de ĝiaj produktaĵoj plialtiĝis je 5% ol tiu de la plej alta nivelo de la pasinta jaro. Laŭ la desegnopapero ekarto de du centonoj de milimetro estas permesata al la mezaj platoj de brakhorloĝo faritaj de la fabriko, dum la fabrikado, la laboristoj malgrandigis ĝin ĝis centono de milimetro post sia klopodo. Dank' al diversgrada altigo de la kvalito de la partoj de horloĝo, la ekarto de ĝia funkciado en diurno malaltiĝis de la antaŭaj plus kaj minus 45 sekundoj ĝis plus kaj minus 30 sekundoj. La ŝanhajaj fabrikoj de normaj maŝinpartoj koncentris la unuopajn fruktojn en la teknika renovigo de la amasoj, aplikis samtempe plurajn projektojn al iuj gravaj renovigaj objektoj por kompari ilin en praktiko kaj akiris sperton post eksperimento. Poste, ili disvastigis laŭplane kaj laŭpaŝe la sperton en ĉiuj entreprenoj de la koncerna



Laboristoj de la Ŝanhaja Vaporturbina Fabriko en muntado

fako, tiel ke la teknika renovigo estas disvolvita de malalta nivelo al alta kaj la produkto-kvanto kaj -kvalito de pli multaj fabrikoj estas altigitaj.

En liberigado de latentaj fortoj por altigi produkton, la ŝanhajaj laboristoj ĉie agas kun valorega spirito de mastro kaj alta socialisma aktiveco. Iliaj revoluciaj agoj estas ĉiam varme laŭdataj kaj kuraĝigataj de la diversnivelaĵaj industriaj gvidantoj. La produktaj planoj de la fabrikoj k.a. entreprenoj laŭ la bezono de la ŝtato kaj ilia konkreta stato estas ofte donitaj al la laboristoj por diskutado, reviziado kaj fina decido. Dum la diskutado pri tiuj novaj planoj kaj novaj taskoj, la laboristoj pensis unue ne pri postulo ke la ŝtato pliiĝu al ili ekipaĵojn kaj laboristojn, sed pri tio ĉu la ekzistantaj homoj kaj ekipaĵoj povas ludi pli

grandan rolon post racia aranĝo kaj reformo. Kaj al ĉiuj konservativaj planoj ili elmetis kritikojn kaj proponojn por rebonigo. Vivan ekzemplon pri tio donas la Ŝanhaja Vaporturbina Fabriko, kie la laboristoj dufoje reviziis la produktan planon de la kuranta jaro. Laŭ la unua plano, la produktokvanto devis plialtiĝi je 20% ol tiu de 1972. Sed la laboristoj montris la utiligeblajn kondiĉojn por plua altigo de produkto. La fabriko altigis la pliproduktan celajon ĝis 42%. Post nelonge la unua kaj kvara laborejoj de la fabriko sinsekve antaŭtempe plenumis la produktan taskon de januaro. Sekve la gvidantoj de la fabriko akceptis novajn proponojn de la laboristoj kaj plibonigis duafoje la planon, tiel ke la plano fariĝis pli konforma al la praktiko kaj pli utila al la produktado.

Flankaj Produktoj de Iu Montvilaĝo

de LIN ĈAŬ-AN

EN la kuranta somero ni venis al Ĉangbaj-montaro kaj vizitis Hin-an-brigadon de Antu-gubernio de la Janbian-a Korea Aŭtonoma Subprovinco de Gilin.

Kiam nia aŭto ruliĝas sur la serpenta monta ŝoseo, ni vidis tra fenestro, ke kontinuaj montoj estas dense kovritaj de arboj kaj gekomunumanoj laboras en verdaj rizkampoj flanke de la ŝoseo. Oni diris al ni, ke en la pasinteco la vilaĝo estis tre malriĉa kaj la loĝantoj ĉu kore-naciaj aŭ han-naciaj senescepte vivis mizere. Post la Liberiĝo, dank' al la prizorgo de la Partio kaj la registaro, ili ne nur bone terkulturis, sed ankaŭ aktive disvolvis multajn flankajn produktojn, plene utiligante la favorajn naturajn kondiĉojn de montregiono, kaj akiris grandan sukceson.

SURMONTAJ BREDEJOJ DE SILKRAŬPOJ

Antaŭ la vilaĝo nin varme bonvenigis sekretario Vang Jongguj de la brigada partia filio. Ni eniris la vilaĝon. Subite aŭdiĝis "pum" de la transa montodeklivo, surprizitaj montaj birdoj brue transflugis super ni. Kamarado Vang Jongguj klarigis al ni, ke bredistoj de silkraŭpoj pafis por fortimigi montajn birdojn. En akompano de Vang Jongguj ni travadis rojon, grimpis sur montosupron per vojeto. Ĉirkaŭe estas homaltaj kverketoj kun densaj foliaroj plantitaj antaŭ kelkaj jaroj. Sekretario Vang Jongguj deŝiris branĉeton kaj montris al ni: "Jen kverkaj silkraŭpoj estas." Ni transprenis la vergeton kaj vidis, ke sur la folioj rampas dikaj kaj lanugaj larvoj verdaj aŭ nigraj. Renkonte al ni venis maljunulo. Li estas bredisto Ĝang

Mingkin. Li invitis nin al lia matbudo kaj diris ke de elkoviĝo ĝis kokoniĝo la bredo bezonas 120 tagojn. Ni pretervole demandis: "Ĉi tie estas la loko alta kaj malvarma kun mallonga senprujna periodo, ĉu la silkraŭpoj ne timas malvarmon?" Kun rideto avo Ĝang respondis: "Sukceso de afero dependas de homo. Por fari pli multajn kontribuojn al la ŝtato, komunumanoj faris kelkjaran eksperimentadon kaj konis la leĝon de kreskado de la silkraŭpoj. Oni uzas hejtatan terliton por elkovado, tiel ke la larvoj elkoviĝas samtempe kaj povas eviti printempan froston. Tio fruiĝas ankaŭ la eksterdoman bredadon kaj evitigas al la silkraŭpoj aŭtunan prujnon. Por ke raŭpoj somere akiru sufiĉajn kverkfoliojn, oni devas racie stuci la arbojn kaj transloki la raŭpojn. Tia bredo ebligas al la silkraŭpoj kreski grasaj kaj grandaj kaj post aŭtuno produkti grandajn kaj dikajn kokonojn kun malmulta akvo. Nun la kverkaj silkraŭpoj ne nur fikse loĝiĝis ĉe Ĉangbaj-montaro, sed ankaŭ la bredado progresas jaron post jaro. Nun la brigado havas 6 bredejojn kaj povos akiri abundan rikolton post aŭtuno."

LABOREMAJ ABELOJ KAJ DILIGENTAJ KOMUNUMANĜOJ

En vizitado ni rimarkis, ke ĉi tie estas kvankam alte kaj malvarme, tamen paradizo por abeloj.


La nektaraj vegetaloj estas tre abundaj. Sekretario Vang diris, ke en 1956 ili havis nur 20 esamenojn, sed nun jam 550. Ili vendis al la ŝtato 110 tunojn da mielo kaj 750 kilogramojn da vakso.

Ni pririgardis iun abelbredejon de la kvara produktogrupo. Ĝi situas en montvalo, kiun trafluas roĵo. Sur la ebena herbejo bonorde viciĝas abelkestoĵ. Abeloj hastas inter floroĵ por kolekti nektaron.

Gastama mastro donis al ni po bovlon da trin-kajo el tilia mielo kaj diris: "Mielo kun multaj sukeroĵ, acidoĵ kaj enzimoĵ estas nutroza." Parolante li malfermis abelkeston, elprenis unu kadron kaj ĉerpis de reĝina ĉelo buleton da flava oleeca substanco por ke ni gustumu. Abelbredisto Vang Hinfa diris ridetante: "Jen reĝina gelato ege nutroza kiu povas kuraci hepatiton kaj aliajn pli ol 20 malsanojn." "Antaŭe ni aplikis naturan esamenigon," diris li ankoraŭ, "kaj ĉiu esameno en unu jaro povis doni nur kelkdek ĝinojn (1 ĝin-o = ½ kg.) da mielo. Poste ni aplikis artan flegadon de abelreĝinoĵ kaj artan esamenigon por kapti la tempon de florado, tial la produktokvanto fariĝis pli kaj pli granda. Nun unu esameno en ĉiu jaro povas produkti pli ol 150 ĝinojn da mielo."

"Dum abelbredado oni devas akurate kapti tempon de florado," ni diris. "Jes ja. Alie oni

Bredisto nutras cervojn.



ne akiros mielon,” ridetante respondis sekretario Vang, “por trovi plej bonan fonton de nektaro, abelbredistoj devas ĉiujare pasigi sep monatojn surkampe kunportante la esamenojn malgraŭ vento kaj pluvo.” Je tio sekretario Vang daŭrigis fingromontrante abelbrediston Vang Hinfa: “Maljuna Vang bredis abelojn jam dekelkajn jarojn kaj akumulis multe da sperto. Li bone konas la tempon de florado de diversaj vegetaloj. Kun la progreso de abelbredado, li kaj liaj kolegoj zorge protektas kaj plantas nektarajn vegetalojn. Krome ili ankaŭ mem kolektas abeltokson kaj reĝinan gelaton por liveri al la ŝtato pli multe.”

VIGLAJ CERVOJ EN VERDA VALO

Oni diris, ke la brigado bredas cervojn. Mate-non de la sekvinta tago ni kun granda intereso venis al la cervobredejo. La bredejo sur suna kaj aeruma deklivo, estas septita en 4 stalojn per kverkaj palisaroj kun alteco de pli ol 3 metroj. Bredisto Ĝaŭ Ĉanglin diris al ni, ke cervoj ŝatas puran loĝejon, tial oni devas konstrui cervostalon en suna, aeruma kaj seka loko.

Aŭdinte nian voĉon, la cervoj ĉiuj sin kaŝis en budojn, levis la kapon akrigante la orelojn. Ni unue iris en vircervan stalon. Tre plaĉas al ni

grasa cervo kun blankaj makuloj kaj ruĝetaj kornoj. Nia eniro ĝenis ĝin. Ĝi eble timis, ke ni refoje segos al ĝi la kornojn. Bredisto diris, ke vircervoj tre amas siajn kornojn kaj ofte metas ilin en akvon por purigi. En luktado cervoj ofte levas la antaŭajn piedojn por protekti la kornojn. Li ankoraŭ koni-gis al ni, ke ĉiuj partoj de cerva korpo estas valo-regaj drogoj, ekzemple, junkornoj, feto, vosto k.a.


Ĝaŭ Ĉanglin kondukis nin en cervinan stalon. Cervinoj ne timas homojn. Ili proksimiĝis al ni kaj flaris niajn manojn kvazaŭ petus de ni manĝaĵon. Kamarado Ĝaŭ ridetante diris, ke en 1971 ili havis nur 20 cervojn kaj nun jam 43. La bona kreskado de la cervoj dependas de la diligenta laborado de la bredistoj. Je la 3-4-a matene, kiam oni ankoraŭ estas en profunda dormo, ili jam ellitiĝis por nutri la cervojn, transporti akvon kaj balai la stalon. Por bonigi la kvaliton de cervaj junkornoj ili iras trans montojn kaj riverojn por kolekti diversajn nutraĵojn. En longaj vintraj noktoj ili devas doni al la cervoj noktan manĝon. Septembro estas la tempo de fekundigo de cervoj plej okupata por la bredistoj. Por ke la cervoj ne mortu aŭ vundiĝu en luktado, ili flegadas tagnokte en la stalo.

Kun granda intereso ni nutris la viglajn cervojn per kverkfolioj kaj longe ne volis forlasi.

Angulo de abelbredejo



En la Hejmloko de Pandoj



PANDO estas rara besto trovebla nur en nia lando. En zoologiaj ĝardenoj pandoj ĉiam altiras al si la rigardantojn. Oni ofte ridas pro iliaj ridindaj movoj kaj longe ne volas foriri de ili. Nia popolo donacis pandojn al la popoloj de Koreio, Usono kaj Japanio. Kaj ĉie kie estas pandoj ili vekas grandan intereson de rigardantoj.

Pando havas longan historion. Antaŭ dekmil jaroj, ĝia raso troviĝis en multaj regionoj. Poste, pro ŝanĝiĝo de la naturo, pandoj preskaŭ malaperis. Nur en montoj de la nordokcidenta parto de Siĉuan-provinco kaj la suda parto de la provincoj Gansu kaj Ŝenhi, pandoj postlasis malmultajn idojn. Tial tiuj lokoj estas nomataj "hejmloko de pandoj".

Antaŭ nelonge mi venis al la hejmloko de pandoj kaj faris interesan viziton.

Montregiona ŝoseo kondukis nin al la gubernio Pingvu en nordokcidenta Siĉuan. Ambaŭflanke de la ŝoseo montoj staras unu super alia. Kunvojaĝanto diris al ni, ke en tiuj vastaj arbaroj, kie kreskas densaj bambuaroj, interplektitaj lianoj kaj dikaj, glataj muskoj, vivas pandoj.

En la gubernia urbo ni vidis du pandojn kaptitajn antaŭ nemultaj tagoj. Ili estis senĝenaj kaj tute ne sentis sin "kaptitoj". La pando iom pli granda frande maĉis sukerkanojn kaj la alia estis en brakoj de homo kaj suĉis lakton el botelo. Kiam oni deprenis de ĝi la cicumon, ĝi tuj blekis kiel dorlotata bebo.

Pando havas du nigrajn orelojn kaj nigrajn ringojn similajn al sunokulvitroj ĉirkaŭ la okuloj. Ĝia korpo estas kovrata de nigraj kaj blankaj haroj simetrie en ambaŭ flankoj. Ĝi estas milda kaj kvieta. Iam ĝi balancas sin sidante sur tero kvaŝaŭ en lulilo kaj iam ĝi promenas tien kaj reen. Pando similas al urso: granda kapo, ronda vizaĝo, ofte sidas kaj "lavas vizaĝon" per la antaŭaj ungoj. Ĝi ofte ludas kaj ŝercas kun siaj kunuloj. Ĝi manĝas multe, ĉiutage 20 kg. da freŝaj bambuoj.

Loĝantoj de la hejmloko de pandoj konigis al ni la historion de pandoj.

Pandoj vivas sur montoj kun alteco de 2,600 — 3,500 metroj super marnivelo. Ili manĝas bambuojn, trinkas el fonto kaj ŝatas grimpi sur arbojn. Ili vivas en densaj arbaroj sur altaj montoj. Tial, kvankam ili estas grandaj, tamen ili estis malfrue trovitaj de homoj, eĉ je 4 jarcentoj pli malfrue ol la eltrovo de Ameriko. En 1937, la unua pando estis portita el ĝia hejmloko. Tiam la reakcia registaro de Ĉinio kaj imperiistoj komplotis unu kun la alia, kaj sendis la pandon eksterlanden por ĉasi profitegon, sed la ĉina popolo ne povis vidi la raran beston.

En la malnova Ĉinio, la sorto de pandoj estis tragika. Ne nur rabobestoj en arbaroj atakis ilin, sed ankaŭ bienuloj, burokratoj k.s. laŭplaĉe kaptadis kaj mortigis ilin. Tiuj aĉuloj uzis pandajn felojn kiel matracojn kaj prenis pandajn plandojn

kiel frandaĵon. Iu bienulo de Muzuo-vilaĝo de la gubernio Pingvu mortigis 12 pandojn. Tial pandoj pli kaj pli malmultiĝis en la malnova Ĉinio.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro proklamis dekreton pri protekto de raraj bestoj, difinis arbarojn kun kompare multaj pandoj kiel malpermesatajn regionojn kontraŭ hakado kaj ĉasado. La koncerna ŝtata institucio projekciis lumbildojn pri pandoj en la arbaraj komunumoj, por ke ĉiuj sciu, ke la raraj bestoj devas esti protektataj laŭ dekreto de la ŝtato.

Dum la vizito ni aŭdis multajn interesajn rakontojn pri protektado de amasoj al pandoj.

Foje, Semenzaŭ, tibeta komunumanino de Bajma-komunumo, venis al rivero por ĉerpi akvon kaj vidis ke pando kuŝas senmove apud la rivero. Ŝi sciis, ke pandoj ofte svenas pro troa trinko kaj en tiu tempo ili estas facile atenceblaj de rabobestoj. Semenzaŭ rapide raportis tion al kadroj de la brigado kaj ĉi tiuj tuj sendis du ĉasistojn por gardi la pandon. La ĉasistoj foriris nur post kiam la pando rekonsciiĝis kaj malrapide eniris en densan arbaron.

En iu tago de la pasinta jaro, membroj de Mupikomunumo iris sur monton kaj pasis preter panda nesto. La surprizita pando-patrino forkuris kaj la du ĵus naskitaj pandoj konsterniĝis en la nesto.



Fortimigita pando-patrino dum mamnutra tempo neniam revenas al siaj idoj. Kion fari? La komunumanoj enbrakumis la pandojn kaj sendis ilin al la administrejo de la brigado. La lasta tuj asignis kuraciston por eskorti la pandojn al la gubernia urbo. Dank' al zorga nutrado, la pandoj kreskis tre amindaj. Nun ili jam transloĝiĝis en zoologian ĝardenon.

Ĉar la popolo protektas pandojn, tial ili fariĝas iom post iom pli kuraĝaj. Ili ofte kuras de sur montoj al rivero por trinki kaj ne forkuras de homoj pro timo. Iuj pandoj eĉ venas en tendojn de arbohakistoj por sin varmigi per fajro kaj manĝi donacojn de arbohakistoj kaŭrante apud ili.

Por protekti pandojn, dombestojn kaj dombirdojn, la tiea popolo aktive ĉasas malutilajn bestojn. En Hjutang-komunumo de la gubernio estas 15-jara ĉasisteto Ĝang Juanfeng. Ekde sia 9-jara aĝo li jam komencis ĉasadon. Post lecionoj, kunportante ĉaspafilon donitan de lia patro li ofte iris en montojn por ĉasi kune kun maljunaj ĉasistoj. Li kaj maljunaj ĉasistoj mortigis multajn malutilajn bestojn. En decembro de la pasinta jaro, li ĉeestis la Ĉasistan Kunvenon de Siĉuan-provinco. En la lastaj 3 jaroj lia komunumo ekstermis pli ol dek-mil malutilajn bestojn.

Nun, la raraj pandoj kies raso estis proksima al perejo, generiĝas kaj kreskas en sia hejmloko sub la protekto de la popolo.



Konstruado

IU sekcio de la fervoja trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo akceptis taskon konstrui tunelan elirejon sur nova fervoja linio. Antaŭ konstruado inĝeniero Vang Liji venis al la konstruejo por kontroli la projekton kaj trovis ke ĝi devas esti plibonigita por ŝpari laborfortojn kaj materialojn. Li interŝanĝis opiniojn kun la projektintoj. Ricevinte aprobon de la gvidantoj, li decidis fari profundan esploradon kaj revizii la malnovan projekton. Kaj la gvidantoj decidis fondi projektan grupon por lin helpi.

Frumatene de la sekvanta tago, Vang Liji kaj la kamaradoj de la grupo komencis labori. Unue ili vaste kolektis opiniojn de soldatoj de la fervoja trupo kaj formis el ili novan projekton. Poste ili esploris la lokon, termezuris kaj analizis la geologian strukturon. Post laborado en kelkaj tagoj arbrito de Vang Liji pligraviĝis. Liaj kamaradoj admonis lin ripozi, li tamen persiste daŭrigis sian esploradon ĝis plena kono de la loko. Fine ili prezentis la novan projekton.

Kiom profunda kaj vasta devas esti la akvokonduka drenejo? Por solvi tiun problemon ili demandis kvin maljunajn komunumanojn en proksimaj vilaĝoj pri la ĉiujaraj akvoniveletoj de la riveretoj en la ĉirkaŭaĵo de la tunelo.

Sur la bazo de tia zorgema esplorado la nova projekto estis ellaborita. La praktiko pruvis, ke tiu projekto ne nur garantiis la bonan kvaliton de la konstruaĵo, sed ankaŭ ŝparis 700,000 juanojn por la ŝtato.



Kurantaj Aferoj



NOVA ATINGO EN ŜPARO DE KARBO POR LOKOMOTIVOJ

La vastaj amasoj de la fervojaj laboristoj kaj oficistoj de nia lando plue disvolvas movadon por ŝpari karbon por lokomotivoj kaj atingis novan sukceson.

De januaro ĝis aprilo de la kuranta jaro, la lokomotivoj de la tuta Ĉinio transportis superŝarĝon de pli ol 18 milionoj da tunoj, kio egalas al funkcio de 70 pliaj vagonaroj en ĉiu tago; la karbokonsuma kvanto por 10,000 kilometroj por tuno de lokomotivo malaltiĝis je 4 kilogramoj ol la plej malalta kvanto en la historio rekordita en la pasinta jaro kaj 197,000 tunoj da karbo estas ŝparitaj.

Multaj administracioj kaj lokomotivaj sekcioj disvolvis amasan aktivadon de lernado de tekniko kaj pliintensigis la

flegadon de lokomotivoj, kio pretigis kondiĉojn por ŝpari pli multe da karbo.

SUKCESA KAPTADO DE MARAJ FIŜOJ EN FRUA PRINTEMPO

La kvanto de akvaj produktaĵoj de la 10 marbordaj provincoj, municipoj kaj aŭtonoma regiono de nia lando en la unua trimestro de 1973 kreskis je 3.28% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

En la fruprintempa fiŝsezono de la kuranta jaro, relative grandan abundon de haringoj ricevis la Flava Maro kaj Bohajmaro. Je la meza kaj lasta tagdekoj de aprilo komenciĝis abundsezono de malgrandaj skienoj. La akvoproduktaĵoj kaptitaj de Ŝandong-provinco ĝis la fino de marto kreskis je 12% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Ankaŭ la fiŝistoj de Liaŭning kaj Hebej akiris bonan sukceson en fiŝkaptado.



La Revolucia Opero «Florvendistino» de Koreio

En flora majo de la kuranta jaro, la fame konata Mansudaj-a Arta Trupo de Pjongjango de Koreio venis laŭ invito al Ĉinio por vizitado kaj prezentado. La koreaj kunbatalantoj portis al la ĉina popolo profundan amikecon de la korea popolo kaj novan frukton de la korea revolucia arto *Florvendistino*.

La nomita trupo estas kun alta arta instruiteco. Direktate de la revolucia literatura kaj arta penso de la granda gvidanto de la korea popolo Prezidanto Kim Il Sen, la arta trupo heredis kaj disvolvis la eminentan nacian artan tradicion, kaj faris distingindan kontribuon por disvolvi la revolucion literaturan kaj artan aferon de la korea popolo. Nun, la opero *Florvendistino* prezentita de la trupo en Ĉinio estas bela floro de la revolucia arto de Koreio.



La tuta familio dronas en ĝojo de rekuniĝo, kaj neniu atendas, ke la fera bienulo ankoraŭ devigos Cer Jong labori kiel lia dungito.



Sun Hi estas brogblindigita de la bienulo kaj Cer Jong estas portata al malliberejo pro lia kontraŭstaro al la bienulo

La eminenta revolucia opero *Florvendistino* estas adaptita laŭ samtitola verko. La afero okazis en Koreio en la komenca periodo de la tridekaj jaroj de la dudeka jarcento. Tiam la feraj hufoj de agresantoj tretis la belan trimil-lian Koreion, kaj la vasta laboranta popolo vivis sub pezaj nacia sufero kaj klasa subpremo. Per la suferoj de la familio de Goz Buni, la opero spegulas la firman batalvolon de la korea popolo por nacia sendependeco kaj liberiĝo, kaj kantas pri la granda revolucia batalo kondukita de la korea popolo sub la gvido de kamarado Kim Il Sen por plena liberiĝo kaj por ke "freŝaj floroj floru ĉie sur la trimil-lia patrolando".



La patrino malsaniĝis pro turmentado de la bienulo, kaj Goz Buni vendas florojn sur strato por aĉeti medikamenton por sia patrino.

La figuro de la bonkora kampara knabino Goz Buni en la opero estas arta tipo de la tiam ekspluatata kaj subpremata korea popolo. Ŝia patro penlaboris tutan vivon kiel dungito de la bienulo kaj mortis kun malamo. Ŝia malpliĝa fratino Sun Hi estas brogblindigita de bolanta likvo de drogo de la bienulo, ŝia pli-aĝa frato Cer Jong estas enkarcerigita pro lia kontraŭstaro al la subpremo de la bienulo kaj ŝia patrino suferas danĝeran malsanon pro la deviga servo kiel dungito ĉe la bienulo. Por kuraci la malsanon de sia patrino, Goz Buni laboras por la bienulo tage kaj vendas florojn nokte. Sed, ankoraŭ ne preninte ŝian drogon, la



Dolore Goz Buni adiaŭas sian plijunan fratinojn por rigardi sian pli-aĝan fraton en la malliberejo.


La amasoj sub la gvido de Cer Jong kaj lia kunbatalanto ekzekutis la bienulon. La tri gefratoj rekuniĝas kaj Goz Buni suriras la revolucion vojon.



La gardisto de la malliberejo diris ke ŝia frato jam mortis. Goz Buni svenas sur la revena vojo kaj vidas siajn gefratojn en sonĝo



patrino jam mortis de la subpremo de la bienulo. Ŝia fratino Sun Hi estas poste trompe portita en profundan montaron de la bienula lakeo kiu intencas mortigi ŝin. Por serĉi sian fraton Goz Buni piediris 350 kilometrojn, sed ŝi ne trovis lin. Kiam ŝi revenas al sia hejmo, ŝi ne trovas sian fratinojn. Tiam kun arda malamo ŝi decideme rapidas al la domo de la bienulo, indigne kondamnas lin, levas drogvazon kaj foron kaj jetas






ilin al la bienulo kaj lia edzino. Ŝia frato Cer Jong forkuris el la malliberejo kaj aliĝis al la revolucia armeo. Poste li revenis al sia hejmloko kaj savis Sun Hi kaj Goz Buni. La vilaĝanoj sub lia gvido faligis la bienulon. La tri gefratoj, sub la ore brila matena suno, suriras la revolucionan vojon kun grandaj paŝoj. La kortuŝa kantoteksto de la opero plene elmontras la revolucionan spiriton de la korea popolo.

(maldekstre) La bienula lakeo trompe portis Sun Hi en profundan montaron intencante ŝin frostomortigi. Goz Buni rapidas al la domo de la bienulo kaj ĵetas drogvazon al ili.

(dekstre) Forkurinte el la malliberejo, Cer Jong aliĝis al la revolucia armeo kaj li renkontiĝas kun sia blinda fratino Sun Hi en profunda montaro.





Varma bonvenigo al la Mansudaj-a Arta Trupo de Pjongjango

La opero *Florvendistino* estas ne nur kortuŝa per sia revolucia enhavo sed ankaŭ alloga per sia eleganta nacia arta formo. En tiu opero la koreaj artistoj prenis senteman kantadon kiel ĉefan esprimmanieron por modli figurojn, kaj ankaŭ bone aplikis la dancarton kaj kantodancon por esprimi la pensojn kaj sentojn de la herooj, tiel ke la arta forto estas pliigita. La zorgeme projektita sceneja arto kun stereografio aldonis al la opero buntan brilon.

Rigardinte la operon *Florvendistino*, ni pretervole pensis ke kiom similaj estis la sortoj de la korea kaj ĉina popoloj antaŭ la Liberiĝo. En la damninda malnova socio, la samajn mizerojn kaj maljustaĵojn de la familio de Goz Buni suferis miloj kaj miloj da aliaj laborantaj popolanoj. La revolucia vojo de kontraŭstaro kaj batalo, kiun suriris la tri gefratoj sub la gvido de la partio, ankaŭ estas la vojo irenda de miloj kaj miloj da laborantaj popolanoj. La ĉina kaj korea laborantaj popoloj havas komunan suferplenan historion kaj formis nerompeblan batalan amikecon per sango en la komuna revolucia batalado. Ĝuste pro tio, la prezentado de la revolucia opero *Florvendistino* en Ĉinio estigis ardan eĥon ĉe la ĉinaj spektantoj kaj ricevis ilian varman aplaŭdon.

Krom en Pekino, la Mansudaj-a Arta Trupo de Pjongjango faris prezentadon ankaŭ en Nankino, Ŝanhajo kaj Ŝengjang. De la bordo de Jalu-rivero ĝis la baseno de Huangpu-rivero, ĉie kien la koreaj kunbatalantoj venis, ili ricevis varman bonvenigon. En la Ĉina-Korea Amikeca Popolkomunumo Honghing de Pekino, en la Ŝanhaja Danclernejo kaj sur la militsipo sur Huangpu-rivero, la dulandaj batalamikoj renkontiĝis kiel intimaj gefratoj, varme interbabiladis kaj amike sin amuzis, ĉie regis gaja atmosfero kaj profunda intimeco inter la ĉina kaj korea popoloj. La floro de amikeco inter Ĉinio kaj Koreio floru eterne de generacio al generacio!

Kultura kaj Amikeca Aktivado



Albana Belarta Ekspozicio en Ĉinio

La belarta ekspozicio "Ĉiuj Popolanoj Estas Soldatoj" de la Popola Respubliko de Albanio okazis en la ĉinaj urboj Pekino, Kantono, Vuhan kaj Ŝanhajo de aprilo ĝis julio, 1973.


Per vivaj artaj figuroj, la pli ol 60 olepentraĵoj kaj pli ol 30 gravuraĵoj elmontritaj en la ekspozicio spegulis la vivon kaj batalon de la albana popolo. Tiuj artaĵoj kreitaj de la albanaj artistoj kun arda revolucia sento de amo al la patrolando kaj popolo donis profundan impreson al la ĉinaj rigardantoj.

La olepentraĵo *La Ĉefkomandejo Estas Fondita* bildigas revoluciajn aktivadojn de la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha kaj aliaj gvidantaj kamaradoj. En la historia Labinot-konferenco je la 10-a de julio, 1943, la ĉefkomandejo de la Albana Naci-liberiga Armeo estis fondita kaj kamarado Enver Hoxha estis elektita kiel ĝia politika komisaro. Gvidate de kamarado Hoxha, la albana popolo kondukis heroan kaj neflekseblan armitan batalon kontraŭ italaj kaj germanaj faŝistoj kaj fine gajnis la nacian sendependecon kaj liberiĝon.



Tri Generacioj (olepentraĵo)
de Clirim Ceka

*Defendi la Venkon
(olepenetraĵo)
de Agim Zajmi*




En la eminenta revolucia historia olepenetraĵo *Heroaj Hekalanoj*, kun respekto al la revoluciaj martiroj la artisto pentris figurojn de la sentimaj membroj de la Popola Konsilantaro de Hekal-vilaĝo, kiuj, malestimaj al la malamiko kaj fidaj al sia fina venko, preferis morti ol cedi eĉ kiam ili vizaĝis al vivofero. Tio forte kortuŝis la spektatorojn. Gravuraĵoj *Nia Vojo* kaj *Ankaŭ Ni Faras Batalon* kaj olepenetraĵo *Tri Generacioj* profunde priskribas kiel la albanaj popolanoj de ĉiuj seksoj kaj aĝoj sin ĵetas al batalo por ekstermi la ferocajn malamikojn. En la olepenetraĵo *Ĉe la Landlimo*, la milicianino kun pafilo en la manoj singardeme defendas la landlimon. Heroo el la armita laboranta amaso estas sukcese modlita de la artisto per fortika figuro kun klara karaktero.

La pekinaj spektantoj varme aplaudis la grandajn sukcesojn gajnitajn de la frataj albanaj artistoj en kreado. La sublima patriotismo kaj batalspirito de la albana popolo spegulitaj en tiuj verkoj profunde inspiris la rigardantojn.

Dum sia vizitado de Pekino, albanaj artistoj kamaradoj Fatmir Haxhiu kaj Skender Kamberi faris multajn skizojn pri laboristoj kaj kamparanoj. Tiuj verkoj montris la amikecon de la albanaj artistoj al la ĉina popolo kaj aldonis buntajn florojn en akcelado de la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio.

Fiŝista danco de Pakistano



La Ŝtata Danca Ensemblo de Pakistano en Pekino

Antaŭ la Unua de Majo, la internacia labora festo, la ŝtata Danca Ensemblo de Pakistano venis al nia ĉefurbo Pekino por fari amikan vizitadon kaj prezentadon. La vizito de la pakistanaj artistoj aldonis al la florbedo de amikeco inter la ĉina kaj pakistana popoloj alian belan bukedon.

Kiam la ensemblo atingis Pekinon, ĝia estro Zia Mohyeddin diris kun emocio: “La amikeco inter la popoloj de Pakistano kaj Ĉinio estas tiel bela kiel printempaj floroj.” Li esprimis sian sinceran amikecon al la ĉina popolo dirante: “Ni prezentos ne nur kun perfekta tekniko, sed ankaŭ kun la tuta koro, kun la sincereco de nia popolo.”

La nacia kulturo de Pakistano havas ĝis nun jam kelkmil-jaran historion. La unuopa, duopa kaj grupa dancoj kaj dancdramo, prezentitaj de la pakistanaj artistoj havas en si okulfrapan nacian koloron, originalan stilon kaj altan prezentarton. *Khat-tak-danco* bildigis la bravecon de la pakistana popolo en rezistado kontraŭ fremdlanda agreso. La tradicia *Sindhi-danco* spegulis ĝojon de junaj


gekampanoj pro riĉa rikolto. La fama dancistino Porveen Qassim ĝuis varman manklakadon de la rigardantoj pro sia solo *Kathak-danco*. La eminenta prezentado de la pakistanaj artistoj ne nur donis al niaj spektantoj ŝancon aprezi la pakistanan nacian kulturon kun longa historio kaj vidi la bravan batalspiriton de la pakistana popolo kontraŭ fremdlanda agreso, sed pli valore estis ke ili portis al ni sinceran amikecon de la pakistana popolo.

Por helpi ĉinajn dancistojn en lerno de pakistanaj dancoj, la pakistanaj artistoj varme kaj senrezerve instruis siajn dancartojn al la ĉinaj geamikoj, malgraŭ laciĝo pro sinsekvaj vizitoj kaj prezentoj.

Je la forveturo de la pakistanaj artistoj de Pekino, la dulandaj artistoj adiaŭis bedaŭre unuj al aliaj kaj la pakistanaj geamikoj laŭte kriis en la ĉina lingvo: “Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Pakistano!”

Ĉinaj Historiaj Restaĵoj Ekspoziciataj en Fremdaj Landoj

La “Ekspozicio de Historiaj Restaĵoj de la Ĉina Popola Respubliko” malfermiĝis en Parizo de



Antaŭ biletejo

Francio je la 8-a de majo, 1973. Poste tiu ekspozicio okazos sinsekve en Britio kaj aliaj landoj.

La ekspozicio inkluzivas pli ol 300 historiajn restaĵojn de "Lantian-a Homo" antaŭ 600,000 jaroj ĝis elterigitaj ĉefurbaj restaĵoj de Juan-dinastio de la 13-a kaj 14-a jarcentoj. Inter ili estas orfadena jadvesto de Doŭ Van, edzino de Liu Ŝeng, princo Ging de Ĝongŝan-princlando de la Okcidenta Han-dinastio, elterigita en Manĉeng de Hebej-provinco, la bronza galopanta ĉevalo elterigita el tombo de la Orienta Han-dinastio en Vuvej de Gansu-provinco, la tri koloraj fajencaj homfiguroj elterigitaj el la tombo de princino Jongtaj, nepino de la imperiestrino de Tang-dinastio Vu Zetian en Ganhian-gubernio de Ŝenhi-provinco, k.a. Ĉiuj tiuj ekspozitaĵoj estis elfositaj post la Liberiĝo.

Tiuj historiaj restaĵoj havas gravan sciencajn valoron por studi la sociajn statojn de Ĉinio en diversaj periodoj, kaj estas valoraj materialoj pri la produkto kaj vivo en primitiva, sklava kaj feŭda socioj de Ĉinio. Ili estas ankaŭ arta trezoro spekulanta la krea talenton de la ĉina laboranta popolo.

La eltrovo de fosilioj de "Lantian-a Homo" estas tre grava. Fosilia modelo kaj restarigita busto de "Lantian-a Homo" estas montritaj. Juĝante laŭ la elfositaj fosilioj, sciencistoj kredas ke la nomita homo vivis pli frue ol Pekina Homo. Ĝi estas unu el la plej fruaj ekzemploj de vertikale staranta homo eltrovitaj tra la mondo.

La ekspoziciata jadvesto konsistas el 2,160 jadaj pecoj kuntenataj per oraj fadenoj kun totala pezo de 700 gramoj. Ĝi estas unu el la du tiom bone konservitaj jadaj vestoj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) elfositaj por la unua fojo. La jadvesto havas formon de homa korpo. La jadvesto estas tiel desegnita ke ĝi konformas al la diversaj partoj de la koncerna korpo en grandeco kaj formo.


Multaj historiaj restaĵoj ekspoziciataj ankaŭ reflektas la kulturalan interŝanĝon kaj amikecajn kontaktojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Diversaj brokatoj kaj gazo kun surprisitaĵoj desegnoj estis elterigitaj dum la Granda Proletara Kultura Revolucio el tomboj en Minfeng (Minja), Turfan kaj aliaj lokoj sur la antikva "Silka Vojo". Ili estas teksitaj silkaj metiartaĵoj de la plej prospera periodo de Tang-dinastio malofte viditaj antaŭe. Kelkaj artaĵoj portas tradiciajn ĉinajn desegnojn kaj ankaŭ desegnojn en la persa stilo.

La ekspozicio tre forte interesis la eksterlandajn rigardantojn kaj ricevis ilian varman bonvenigon. Ĝi ankaŭ helpas diverslandajn amikojn profunde koni niajn antikvajjn kulturon kaj arton kaj pliigas la amikecon inter la popoloj de la diritaj landoj kaj Ĉinio.

Vizitantojn interesas la bronzaĵoj elfositaj el tombo de la Orienta Han-dinastio en Vuvej-gubernio de Gansu-provinco.



Afriko en Unuiĝo kaj Batalo



La kunvenejo de la Dekaj Sesio de Ŝtataj kaj Registaraj Estroj de la Afrika Unueca Organizo

LA 25-a de majo ĉijare estas la deka datreveno de la Afrika Liberiga Tago.

Antaŭ dek jaroj la ĉefoj, registaraj gvidantoj kaj delegitoj de 31 sendependaj ŝtatoj de Afriko okazigis en Addis-Abeba kunvenon (de la 22-a ĝis la 26-a de majo, 1963), adoptis la Ĉarton de la Afrika Unueca Organizo. Ili decidis, ke la 25-a de majo, en kiu ili subskribis la ĉarton, estas Afrika Liberiga Tago. La naskiĝo de la Afrika Unueca Organizo skribis novan paĝon en la historio de la movado de nacia sendependeco en Afriko kaj signifas, ke la afrikaj popoloj gajnis novan disvolviĝon en ilia unuiĝa batalo kontraŭ imperiismo.

En la pasintaj dek jaroj la afrikaj popoloj plifortigis sian unuiĝon kaj akiris tre grandajn venkojn en la bataloj kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo, rasismo, hegemoniismo de potencoj kaj cionismo. La afrikaj popoloj, kiuj pasinte estis dividite regataj de imperiismo kaj koloniismo, nun ludas ĉiam pli gravan rolon en internaciaj

aferoj sin apogante sur siaj pligrandiĝantaj fortoj kaj unuiĝa batalo. Jam venas la epoko, en kiu la afrikaj popoloj tenas sian sorton.

De la 27-a ĝis la 29-a de majo de 1973 okazis en la Afrika Domego de la etiopia ĉefurbo Addis-Abeba la Dekaj Sesio de Ŝtataj kaj Registaraj Estroj de la Afrika Unueca Organizo. La kunveno resumis la sperton de la batalado de la afrikaj popoloj en la pasintaj dek jaroj, difinis la taskon por la venontaj dek jaroj kaj pluapasaŭ antaŭenpuŝis la aferon de la batalado de la afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo.

UNUIĜA BATALO KONTRAŭ LA MALAMIKOJ

Post la Dua Mondmilito, precipe post la sesdekaj jaroj, la naciliberiga movado de Afriko disvolviĝas rapide, vaste kaj profunde. Ĝis nun 41 afrikaj landoj gajnis sendependecon. Tiuj landoj



Etiopia imperiestro Haile Selassie faras paroladon en la sesio

daŭrigas siajn batalojn por firmigi la nacian sendependecon, disvolvi la naciajn ekonomion kaj kulturon. En la pasintaj pli ol dek jaroj, la ankoraŭ ne-sendependiĝintaj regionoj disvolvis armitan batalon por akiri sian nacian sendependecon, kaj ankaŭ la amasaj movadoj por oponi kontraŭ kolonia regado kaj rasa diskriminacio disvolviĝas kun nova forto. Tamen, imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo neniam volentas akcepti sian malvenkon. En komploto, unuflanke ili freneze subpremas la batalon de la ne-sendependaj popoloj de Afriko por nacia sendependeco, kaj aliflanke faras senĉese penetriĝon, intervenon, renversadon kaj invadon kontraŭ sendependaj landoj, intencante estingi la flamon de la batalo de Afriko por nacia sendependeco. La brava popolo de Afriko rebatis la defion de la malamikoj per sia firma batalo. En 1972, la delegitoj de 40 sendependaj landoj solene deklaris en Rabat, ĉefurbo de Maroko: La ĉefa celo de la afrikaj landoj estas "liberigi la tutan Afrikon el sub la regado kaj okupado de fremdaj landoj", "la invado kontraŭ unu el la membroŝtatoj de la Afrika Unueca Organizo signifas invadon kontraŭ ĉiuj ĝiaj membroj". Fronte al la komuna malamiko, la afrikaj popoloj firmigis kaj disvastigis la kontraŭimperiisman unuecan fronton kaj

formis novan situacion de unuiĝa batalo kaj reciproka subtenado en la tuta Afriko.

La situacio sin prezentas ĉefe en tio, ke la afrikaj sendependaj landoj multe plifortigis sian unuiĝon kaj reciprokajn subtenon en la bataloj kontraŭ agreso, renversado kaj interveno kaj por defendi nacian sendependecon kaj suverenecon. Samtempe ili donis pli kaj pli multe da spirita kaj materia helpo al la naciliberiga movado de la ankoraŭ ne-sendependiĝintaj regionoj. Multaj landoj frakasis provokon kaj invadon de koloniistoj kaj novkoloniistoj kaj rasistoj kaj defendis sian sendependecon, suverenecon kaj sekurecon, sin apogante sur siaj popolaj bataloj kaj subtenate de la frataj landoj de Afriko. En la lastaj jaroj, Kongolo plurfoje fiaskigis kontraŭrevolucion ŝtatrenverson instigitan de imperiismo; Sudano subpremis unu post la alia armitajn ribelojn kaj renversajn agadojn planitajn de imperiismo; kaj Zambio, Tanzanio, Kongolo, Gvineo kaj Senegalio respektive fiaskigis ĉantaĝon, armitan provokon kaj agreson faritajn de kolonia instanco de Portugalio kaj rasismaj reĝimoj de Sud-Afriko kaj Rodezio. En la fino de 1970, subtenate de aliaj landoj de Afriko, Gvineo rapide repuŝis la armitan invadon de dungita armeo de Portugalio.

En januaro ĉijare, la rasisma reĝimo de Rodezio arogante decidis fermi la landlimon inter Rodezio kaj Zambio por detranĉi la teran trafikadon de Zambio al eksterlando, detruji ĝian ekonomian vivon kaj devigi ĝin rezigni subtenon al la batalo de la zimbabvea popolo. Sed la registaro kaj popolo de Zambio firme rebatis la senhontan ĉantaĝon. Kaj ĝiaj najbaraj landoj Tanzanio, Kenjo kaj Malavio tuj disponigis al Zambio novan vojon kaj havenon por ĝia trafiko. La registaro de Tanzanio ankoraŭ cedis al Zambio siajn du havenojn por ĝia uzo kaj prenis aliajn havenojn por sia vartransportado. Ankaŭ Zairo, Kenjo kaj Bocvano donis al Zambio financon kaj materialan helpon. Sub la unueca batalo de afrikaj landoj la instanco de Rodezio estis devigita nuligi la landliman fermon.

FORTIGO DE KUNLABORO


Kun pliapaŝa disvolvigo de la naciliberiga movado de Afriko, por firmigi nacian sendependecon kaj disvolvi nacian ekonomion, la popoloj de afrikaj landoj forte postulas plifortigon de siaj amikaj kunlaboroj, eliminon de izoliteco inter la regionoj kaj landoj de Afriko, kaŭzita de la longtempa regado de la okcidentaj koloniistoj.

La registaroj kaj popoloj de afrikaj landoj faras pli kaj pli multajn diplomaciajn interkontaktojn kaj amikajn vizitojn. En la reciprokaj vizitoj, multaj ŝtatestroj kaj registaraj delegitoj interŝanĝis opiniojn kaj faris akordigon de politikoj, kio plifortigis ilian reciprokan rilaton kaj akcelis la disvolvigon de la unuiĝa batalo kontraŭ imperiismo en Afriko.

En la lastaj jaroj, ĉiam pli laŭtas la voĉoj de afrikaj landoj pri plifortigo de la kunlaboro en disvolvo de la nacia ekonomio. Multaj landoj jam starigis kunlaboron ambaŭ-flankan aŭ regionan en agrikulturo, akvoutiligo, financo, komerco k.a. Por protekti siajn ekonomiajn interesojn, la afrikaj ŝtatoj ĉiam pli prenas komunan starpunkton kontraŭ ekspluato kaj diskriminacio de iuj evoluantaj landoj. Ili profunde konis, ke en la ekonomia kunlaboro la principo de memstareco, egaleco kaj reciproka utilo devas esti efektivigata, kaj oni ankoraŭ devas teni singardemon kontraŭ konspiroj de penetriĝo, superregado kaj interveno de imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo. La kunveno de ministroj de afrikaj landoj lastatempe okazigita en Abidjan, ĉefurbo de la Respubliko de Eburbordo, por diskuti problemojn de komerco, disvolvo kaj mono koncentre spegulis la esperon ke ilia reciproka kunlaborado de Afriko ebligu al ili mobilizi grandajn homfortojn kaj naturajn riĉfontojn por rapide realigi ekonomiajn reformojn kaj sendependecon.

Tamen tion profunde malamas imperiismo, koloniismo kaj novkoloniismo. Ili ĉiamaniere kreas konfliktojn kaj kontraŭstarojn inter afrikaj popoloj, ofte utiligante problemojn de landlimo kaj teritorio, triboj kaj nacioj, konfesioj kaj kontraŭdiroj inter regionoj. Sed la afrikaj popoloj malkovris tiujn intrigojn de la malamikoj kaj komprenis, ke ili nepre devas defendi kaj plifortigi sian kontraŭimperiisman unuiĝon, se ili volas venki la ferocajn malamikojn kaj akiri ĝisfundan liberiĝon de afrika kontinento. Kun tia volo multaj afrikaj landoj solvis siajn konfliktojn post la interkonsiliĝoj en la lastaj jaroj, ekzemple tiel agis Alĝerio kaj

Generalo Yakubu Gowon, prezidanto de la Afrika Unueca Organizo kaj ŝtata ĉefo de Nigero, rigardas militakiraĵojn de la Mozambikaj Patriotaj Armitaj Fortoj en batalo.



Maroko, Ekvadora Gvineo kaj Gabono, Gvineo kaj Senegalio. Sudano kontentige solvis la problemon de suda Sudano per interna interkonsiliĝo. Tiuj faktoj montris, ke la afrikaj popoloj kun sama tragedio kaj komuna tasko de la batalo estas kapablaj solvi siajn problemojn postlasitajn de la historio kaj elimini aperontajn disputojn pere de paca interkonsiliĝo kaj surbaze de interkomprenemo, nur se ili ekskluzivas eksterajn intervenojn. Ankaŭ internajn problemojn la afrikaj registaroj kaj popoloj povas solvi per ĝustaj politikoj por firmigi solidarecon de la lando kaj unuiĝon de la popolo.

KONTRAŬ HEGEMONIO DE LA SUPERPOTENCOJ

La unuiĝanta kaj batalanta Afriko, kiel grava forto de la tria mondo, ludas pli kaj pli grandan

rolon sur la internacia politika scenejo kaj en la komuna batalo de la mezgrandaj kaj malgrandaj landoj kontraŭ imperiismo, koloniismo, superpotenca hegemonio kaj perforta politiko. Pro la forta postulo kaj batalado de la afrikaj landoj, la Sekurca Konsilantaro de la Unuiĝintaj Nacioj okazigis specialan kunvenon unuafoje en Afriko je la komenco de 1972; la dua komitato de la 27-a Ĝenerala Asembleo de UN fine decidis instali la sidejon de media sekretario en Kenjo. Pro firma batalo de afrikaj landoj, la Internacia Olimpika Komitato elpelis la sportan organizon de Sud-Afriko el la Olimpiaj Ludoj de 1970 kaj devigite nuligis en 1972 sian inviton de la sporta organizo de la rodezia rasisma reĝimo al la 20-aj Olimpiaj Ludoj. Ĉio ĉi tio ne nur montris la grandan forton de la afrikaj popoloj en la unuiĝo kaj batalo,



Nia Bulgemdeĥ

LI ĜANHENG

KAMARADO Bulgemdeĥ estas estro de nia rekognoska plotono, en kiu koletiĝas anoj de pluraj naciecoj. La plotonestro estas mongolo, nia subplotonestro kamarado Udingke heĝe-o kaj mi han-o; inter miaj kunbatalantoj sin trovas anoj de 7-8 naciecoj inkluzive de ovenke-o, dahuro, koreo kaj manĉuro. Proverbo diras: Kvankam la koloroj de ĉevaloj estas malsamaj, tamen ĉiuj hufoj kuras sur la sama vojo. La pli ol 30 personoj de nia plotono agas unuanime kaj marŝas samtakte. Nian forte solidaran kolektivon ne povas malordigi kaj rompi eĉ la plej feroĉa "blankhara vento" sur la stepo. Oni diris admire: "Ĉar la plotonestro portas bonan nomon Bulgemdeĥ (kiu signifas unuiĝon en la mongola lingvo), nature la trupo de li gvidata estas solidara!" Vere tiel estas. En la pasinta pli ol unu jaro post mia rekrutiĝo plej profunde impresis min okazintaĵo sur la stepo Dalinor en nokto de severa vintro, dum kiu blovis "blankhara vento".

Tiutage, mi kaj subplotonestro Udingke forlasis la plotonon kaj surmonte gardis 50,000 kg. da fojno. Neĝegado daŭris unu diurnon kaj ĉesis vespere. Tamen la ĉielo ne sereniĝis, kaj nuboj kuris unuj post la aliaj kvazaŭ surprizitaj ŝafoj; surtere neĝo strie flugis kaj dancis. Rigardante

tion, mi rememoris diron de plotonestro Bulgemdeĥ: Flugad' de plumbaj nuboj post neĝado aŭguras blovon de "blankhara vento". Kaj "blankhara vento", sekegeco kaj lupro estas nomataj de la paŝtistoj kiel "la tri detruantoj" sur la stepo. Tia vento de 8 gradoj alportas malvarmegon de pli ol 40°C sub la nulo, kiu povas frostorigidigi brutojn, perdigas vojon al vojaĝantoj kaj forportas jurtojn!

"La fojno estas vivtenaĵo de militaj ĉevaloj, ni ne devas lasi 'blankharan venton' ĝin forporti. Malgranda Gu, gardu la jurton, mi iros kontroli la fojnejon." Dirinte tion la subplotonestro eliris el la jurto, kun fasko da ledaj ŝnuroj kaj tordstango. Kvankam mi jam estas "malnova soldato" de pli ol unu jaro, tamen nia subplotonestro ankoraŭ rigardas min kiel rekruton. En faro de ĉio ajn, li ĉiam prenis por si la plej pezan laboron. Se mi provis konkuri kun li en tio, li ĉiam diris: "Ne konkuru kun mi en tio, ja ankaŭ mi ne povas konkuri en laboro kun plotonestro Bulgemdeĥ." Vole ne vole mi devis pretigi por li la nigran ĉevalon. Je la adiaŭo, Udingke haltigis la ĉevalon kaj kriis kun turnita kapo: "Atentu, neniam foriru de ĉi tie."

sed ankaŭ tion, ke ilia justa voĉo ne povas esti neglektata.

En la lastaj jaroj, afrikaj landoj kune kun la aliaj landoj de la tria mondo aktive disvolvis la batalon kontraŭ mara kaj ekonomia hegemonio de superpotencoj. En la Komerca kaj Disvolva Konferenco de UN kaj la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN, ili indigne malkaŝis ke iuj disvolviĝintaj landoj havas monopolon super la internacia merkato, transdonis ekonomian krizon al aliaj kaj barbare rabadis kaj ekspluatadis la disvolviĝantajn landojn per neegala komerco, kaj postulas starigon de la internaciaj ekonomiaj kaj komercaj rilatoj surbaze de egaleco kaj reciproka utilo. En la antaŭnelonge okazigita kunveno de la Marlita Komitato de UN, delegito de afrika lando deklaris, ke ĉiu lando havas rajton difini sian teri-

torian maron kaj ekonomian regionon, oponente kontraŭ mara hegemoniismo de superpotencoj.

Krome, la apudmaraj landoj de Norda Afriko havas fortan voĉon, ke “Mediterraneo apartenas al mediterraneaj landoj”, kaj multaj landoj de orienta kaj meza Afriko esprimis sian firman subtenon al la justa opinio pri “la Hinda Oceano kiel paca regiono”. Tio klare montris la firman volon de la afrikaj popoloj batali kontraŭ ekspansiismo de la potencoj en maroj kaj defendi maran suverenecon, pacon kaj sekurecon de sia propra regiono.

La grandaj afrikaj popoloj estas marŝantaj antaŭen. Kun la profunda disvolviĝo de la afrika revolucio kaj ĉiam pli firmiĝanta unuiĝo en la batalo kontraŭ imperiismo, la afrikaj popoloj certe akiros pli grandajn venkojn.

Iom post iom malheliĝis. Post plifirmigo de la jurto per palisoj kaj ŝnuroj, mi komencis atendi la subplotonestron. Mi atendis kaj atendis kaj trifoje altigis la lanternan meĉon, sed ankoraŭ ne vidis signon de lia reveno. La vento blovdas ĉiam pli forte. Aŭdinte ronkadon de ĉevaloj, mi sciis, ke ekblovas “blankhara vento”! Mi ne plu povis sidi trankvile kaj surmetis al mi peltan surtuton. Mi prenis selon kaj kiam mi etendis manon al la lanterno, mia mano estis kaptita de ŝvita manego. “Oh, revenas subplotonestro!” mi ĝoje kriis.

“Ha-ha, kio kovras la okulojn de nia bona ĉevalo!” Per la serena rido mi konstatis, ke venas plotonestro Bulgemdeĥ. Li surhavis neĝajn lanugojn tutkorpe, eĉ liaj okulharoj blankiĝis. Fusilo sur lia ŝultro, vipo en la dekstra mano kaj du blankaj peltaj surtutoj sur la maldekstra brako.

“La subplotonestro. . .” mi balbutis pro brula maltrankvilo.

“Kamarado Udingke?” la plotonestro min rigardis atente kaj komprenis min. “Li iris al la fojnejo, ĉu ne? Je kioma horo?” “Je la kvara.” “Kioma horo nun estas?” “La sepa.”

“Nu, verŝajne mi devos fari ĉinokte kaŝludon kun Udingke en la ‘blankhara vento’,” diris la plotonestro ridetante.

Mi sciis, ke li estas malcedema kaj optimisma, eĉ “blankhara vento” ne povas forblovi lian ride-ton. Tamen, aŭdinte lian diron, mi sentis kvazaŭ

mia koro estus gratita de kataj ungoj. Mi pentis, ke mi lasis subplotonestron sola foriri.

“Kion fari do?”

Plotonestro Bulgemdeĥ diris firme: “Kiam kunbatalanto sin ĵetas al ‘lango’ (‘lango’ — malamiko kaptita por ricevi informojn) dum rekognoskado, ni devas ŝirmi lin per pafilo; kaj kiam li revenas al la kazerno sur stepo en neĝblova nokto, ni devas montri al li la vojon per levita lanterno!” Ĉiuj liaj vortoj trafis mian koron.

“Malgranda Gu, mi iras al la fojnejo por esploro.” Ĉu mi ankaŭ lasu la plotonestron iri? Tio ne konvenas, mi iru! Kun tiu penso mi tuj deprenis la lanternon antaŭ ol la plotonestro povis tion fari, kaj paŝegis al la pordo. Rimarkinte min firme decida, li diris: “Bone, do surmetu tiun ĉi peltan surtuton.”

Ĉu mi ne jam surhavas tion? Kial ankoraŭ surmeti plian? Vidante ke mi ne komprenas lian intencon, li komencis instrui al mi: surmetu ilin tiel ke iliaj lanoj kuniĝu kaj streĉe ĉirkaŭligu la talion per tornistra rimeno. “Nu, dank’ al tia aranĝo ‘blankhara vento’ neniom enpenetros ĉu fronte aŭ dorse.” Mi sentis varmon en la koro kaj diris: “Plotonestro, bonvolu surmeti ĉi tiun.”

“Ĉu mi? Kiel lokaj ŝafidoj mi jam povas elteni tian froston.” Tion dirante li lumigis la elektran torĉon kaj ĝin elŝovis tra fendo de la jurto. “Lasu ĝin gardi por ni la hejmon.”

Ni rajdis el la montvalo al ebenejo. En sufoka kaj blindiga neĝvento, ni plue galopis kvin km.



kaj atingis la fojnejon. Trifoje ni ĉirkaŭrajdis la ĉ. cent fojnostakojn kaj trovis, ke ili ĉiuj staras bonorde kaj tiuj starantaj sur deklivo rekte kontraŭ la vento estis firme fiksitaj de Udingke per ŝnuroj kaj ŝtonoj, sed ni ne trovis lin kaj lian ĉevalon. Ŝajne li perdis la vojon! Mia koro estis kvazaŭ diŝŝirita de la “blankhara vento” kaj tuj ekvokis laŭte: “Subplotonestro — Udingke —” Sed la ventego hurlis kiel lupoj kaj neĝeroj flugis kiel ŝtonetoj. Niaj voĉoj estis sufokitaj. Kvankam mi distancis de la plotonestro nur kelkajn metrojn, tamen por paroli kun li mi devis formi antaŭbuŝe funelon per la manoj kaj longigi la voĉon.

“Jam pasis kvar horoj, ĉu la subplotonestro vundiĝis de frosto . . .?”

“Neeble, la sango de batalanto povas degeligi dikan tavolon da neĝo . . .”

Mi sciis, ke li tion diris nur por min kuraĝigi. Ankaŭ li maltrankvilis — parolante li senĉese levis la lanternon.

“Kien ni rajdu por lin trovi . . .?”

La plotonestro levis la lanternon antaŭen: “Kie estas tie?” “La kampejo de nia roto.” “Probable Udingke revenis tien.” Al la kampejo de la roto? Tiu ĉi loko distancas de ĝi je 60 km., de la kampejo de la plotono je 15 km. Kial subplotonestro revenis al tiu de la roto? Mi tuj proksimiĝis al la plotonestro por pridemandi la kialon.

“Malgranda Gu, kiom da tagoj pasis post la veno de lia nigra ĉevalo de la kampejo de la roto?”

“Tri tagoj.”

“Prave, la bona ĉevalo konas la iritan vojon, ĝi certe portis sian mastron al la malnova hejmo!”

“La subplotonestro ja ne povis lasi la ĉevalon agi laŭplaĉe!”

“Ho, ne laŭ ĝia plaĉo sed laŭ la cirkonstanco!”

Aŭdinte tion, mi ĝojiĝis kaj poste demandis maltrankvile: “Ĉu ni povas renkonti lin sur tiel vasta neĝkovrita stepo?”

“Ha-ha, neĝo kovras viajn okulojn, ĉu ne? Rigardu la lanternon! — Per kio via subplotonestro direktis sian ŝipon, kiam li fiŝis sur la rivero Usuli?”

“Tage per buoj kaj nokte per lanterno.”

“Prave, tute prave! Do ni ne babilu, sed spronu la ĉevalojn kaj portu la brilan lanternon al la vojaĝanto perdinta la vojon.”

Rajdinte tra senhoman vastejon, ni venis en terenon de sablomontetoj. Ĉar neĝo plenigis la sulkojn kaj kavojn, niaj ĉevaloj ĉiam estis en danĝero fali en kavojn. Subite la plotonestro forte tiris la kondukan rimennon de la ĉevalo kaj diris decideme: “Haltu! Sekvu min post kiam mi rajdos antaŭen je dekkelkaj metroj!”

Kiam nia plotonestro estis knabo 9.5-jara, li jam povis rajdi nedresitan ĉevalon sen selo kaj akiris ĉampionecon en rajd-konkurso. Sed, kiu povis garantii sekurecon dum muĝis ventego, furiozis neĝo kaj la vojo insidplenis? Li tamen ne permesis al mi rezonadon kaj spronis la ĉevalon, kiu tuj galopis antaŭen preter mi.

Tenante la lanternon kun flanken klinita korpo li lumigis al mi la vojon. Rigardante la flagrantan lumon, mi rememoris fragmentojn de pasin-

taĵoj: Plotonestro Bulgemdeĥ ĉiam zorgas pri la unuiĝo de la kolektivo, li emfazas kunagon dum batalo, interhelpon dum laborado kaj prizorgon al kamaradoj en la vivo. Iun fojon, dum rekognoska ekzerco, kiam ni kaptis “langon” kaj rajdante revenis al nia kazerno, la “malamika” trupo postkuris. Udingke ordonis ke mi kun aliaj du batalantoj eskortu lin foriri, kaj li mem restis por bari la “malamikojn”. Transdoninte la militkaptiton al Bulgemdeĥ, mi pensis ke mi jam plenumis la asignitan taskon. Sed la plotonestro surĉevaliĝis kaj elingiginte la glavon forrajdis kriante “hura” kun la tuta plotono sub sia gvido por ataki la helpan trupon de la “malamiko”. Poste li diris: “La vice flugantaj anseroj estas nedisigeblaj, ĉar ili havas komunan celon flugi al la varma sudo. Ni unuanime batalas ja por efektiviĝi la grandan idealon de komunismo!”

Subite, amaso da neĝeroj ĵetiĝis al mia vizaĝo kaj poste aŭdiĝis tirata henado. Mi rigardis streĉe kaj vidis, ke la plotonestro kaj lia ĉevalo jam malaperis kaj nur la lumo brilis jen supre, jen malsupre. Evidente, li kaj la ĉevalo falis en neĝan kavon. Mi spronis mian ĉevalon antaŭen, haste malligis la rimenon ĉirkaŭ mia talio kaj ĵetis ĝin al li...

Ni denove rajdis antaŭen kun la lanterno flagranta. La ĉevaloj portis nin en larĝan kaj longan profundan valon. Ni rajdis unu tuj post la alia.

“Haltu, Malgranda Gu! Aŭskultu hurladon de lupoj!” Lupoj! Ni ekdubis, aŭdiĝis ja nur siblado de vento kaj bruoj de hufoj sed ne hurlado de lupoj. Tamen oni ne devas dubi pri la oreloj de nia plotonestro.

Jes ja, aŭdiĝis pli kaj pli klare hurlado de lupoj. La plotonestro subite streĉis la buŝbridaĵon de la ĉevalo kaj kovris la lumon per sia basko.

“Malgranda Gu, aŭskultu, ĉevalo henas!”

Jes, sendube! Kvankam mi ne povis bone distingi hurladon de lupoj, tamen mi ĉiutage kunestis kun ĉevaloj kaj povis bone distingi eĉ tre mallaŭtan henon de ĉevaloj.

“Malgranda Gu, aŭskultu, malsataj lupoj kuras al la ĉevalo, rapidu!” La plotonestro elpoŝigis ŝargilon da kartoĉoj kaj premis ĝin en la ŝargujon de sia fusilo kaj ankaŭ mi puŝis kartoĉon en la kulason de la mia.

Ĉiam pli klare aŭdiĝis la henado kaj hurlado. Jes, henis la ĉevalo de Udingke.

“Rapidu, alproksimiĝu kaj etendu la bajeton de via fusilo!”

Ni kuŝiĝis surventre nemalproksime de la ĉevalo. La plotonestro replilumigis la lanternon. De malalteco al alteco, per helpo de neĝa rebrilo ni malklare vidis, ke malsataj lupoj sin ĵetis al la ĉevalo. Dekkelkajn metrojn, dek metrojn, kelkajn metrojn, la siluetoj de la lupoj kaj ĉevalo estis tuj koliziĝontaj. “Pafu la frontan lupon!” Ni ambaŭ kriis unuvoĉe. “Paf!” La plotonestro faligis la lupon per sola pafado. Vidinte la antaŭan lupon kuŝigita, la hordo malordiĝis, tuj poste la lupoj sin turnis al nia lanterno. Ankaŭ mi ekpemis la el-lasilon. Aŭdiĝis kelkaj pafadoj, sekvis hurloj, kaj aro da lupoj sterniĝis. La restaj vunditaj lupoj lame forkuris jelpante. Ne havante tempon por kolekti la ĉasaĵojn, mi kaj la plotonestro spronis niajn ĉevalojn al Udingke.

La subplotonestro estis savita. Sed pro tro longa frostado, li jam ne havis forton por stariĝi. Li rigardis la lanternon kaj la buŝo tremis: “Gu-Gu-” Kaj parolante li palpis miajn vangojn per sia malvarmega mano, mi diris haste: “Subplotonestro, jen estas mi, alvenis ankaŭ plotonestro Bulgemdeĥ. Kiel vi sentas vin?” “Bone, bone, ...” Li subite premis la rigidajn manojn en la neĝon kaj volis sidiĝi.

Mi sciis, ke li estas malforta pro frostado kaj lia lango rigidiĝis. Mi tuj demetis mian peltan surtuton, ankaŭ la plotonestro donis sian surtuton metitan sur la selo. Mi prenis ambaŭmane neĝon kaj per ĝi frotis la manojn de Udingke, kaj la plotonestro malfermis la sinon kaj premis lian vizaĝon al sia varma brusto.

“Subplotonestro, diru, ĉu ankoraŭ malvarme?” Sub la lumo de la lanterno mi vidis, ke li malfermis sian buŝon. “Malgranda Gu, kiel vi fartas? Ĉu malvarme?” “Ne, ne, ne...” “Tiel vi diras, tamen viaj dentoj klakas kaj la lango ŝvitas, Ĉu ne? Ha —” Li ekridis, kaj lia mieno gravuriĝis en mia koro.

“Malgranda Gu, tuj helpu subplotonestron surĉevaliĝi kaj galopigu la ĉevalon!”

La ĉevaloj galopis ĉ. 10 km., la skua rajdado varmigis Udingke. Tiam la “blankhara vento” malfortiĝis. Ni trovis budon kaj iris en ĝin.

Plotonestro Bulgemdeĥ prenis de fundo de la budo sekajn bovfekaĵojn kaj ĝoje diris al ni: “Tie ĉi estas nur 15 km. for de la roto!”

“Ĉu tiel proksime?”

“Jes, nia plotonestro estas malnova loĝanto sur Dalinor-stepo!”

Ĉu li estas malnova loĝanto de Dalinor-stepo? Rigardante la flamon de la brulanta bovfekaĵo, subite mi rememoris longe nesolvitan enigmon. "Plotonestro, vi ofte diras, ke vi estas deveninta de Dalinor, sed oni diris, ke via hejmloko estas Udan!"

La plotonestro fikse rigardis la lanternon kaj longe silentis.

"Malgranda Gu, tio envolvas historion signifoplenan!"

Je la stimulo, mi skuis brakon de la plotonestro kaj petis, ke li rakontu.

"Bone, Malgranda Gu, unue pendigu la lanternon ekstere."

"Antaŭ la Liberiĝo," rakontis la plotonestro, "mia hejmo estis en Udan. Mia patro ne volis esti dumviva sklavo de brutoposedanto, forkuris al Dalinor kaj tie aliĝis al la popola kavalira regimento. Informiĝinte pri tio, la brutoposedanto pelis el la terdomo mian patrinon, kiu gravediĝis je pli ol kvin monatoj. Mia patrino piediris 49 tagojn sur la stepo. En iu nokto kun "blankhara vento" ŝi povis neniom plu sin movi antaŭen. Tiam ŝi subite vidis grajnon da lumo, kaj rampis al ĝi per ĉiuj siaj fortoj. Tie estis la roto de mia patro plenumanta taskon sur la stepo. Sed mia patro ne estis en la jurto, li rajdis kune kun han-a onklo Ĝang al Darhan por preni informon. La lanterno sur la pordo, kiun mia patrino vidis, estis pendigita de la rotestro, dahur-a onklo Buhe, por montri vojon al mia patro kaj onklo Ĝang dum ilia reveno. Panjo longe atendis kaj mi naskiĝis antaŭdate en la varma domo. Paĉjo fine revenis, sed onklo Ĝang martiriĝis. Ĉar dum la reveno ili renkontis survoje rajdantajn banditojn. Paĉjo ŝirmis per sia korpo ledan saketon kun la informo kaj onklo Ĝang ŝirmis paĉjon per sia korpo. La sango de onklo Ĝang fluis sur la vangojn de mia patro... Kaj ĝuste kiam panjo naskis min, onklo Buhe kun kavalira taĉmento sub sia gvido disbatis la banditaron kaj elsavis mian patron. Kiam paĉjo rigardis min sub lamplumo post sia reveno, la sango miksitita kun ŝvito sur lia vizaĝo gutadis sur mian vizaĝon. Por memori la batalan ami-

kecon de nacia unuiĝo, paĉjo decidis ke mi ĉiam loĝu en Dalinor, kaj donis al mi la nomon Bulgemdeĥ."

"Bulgemdeĥ signifas unuiĝon!"

"Jes," la plotonestro diris emocie, "nia nacia unuiĝo formiĝis sub la partia gvido, hardiĝis en batalo per sango de la revoluciaj antaŭuloj. Ni nepre devas heredi tion kaj transdoni ĝin al la venonta generacio!"

Subite, mi vidis multajn lumojn sur la malhela ĉielo. Ho! unuj apud aliaj, sennombraj fajropunktoj. La kamaradoj de nia roto venis! Mi, plotonestro Bulgemdeĥ kaj subplotonestro Udingke iris renkonte al ili mano en mano kaj ŝultro ĉe ŝultro.

(Ilustraĵoj de Ŝelengjehi)





Ĉinaj Naciecoj

Va-nacio

de ZONGMING

VA-NACIO kun 170,000 anoj sin trovas en Ava-montaro en la sudokcidenta parto de Junnan-provinco de Ĉinio. Ili plejparte loĝas en la gubernioj Cang-juan kaj Himeng, kaj aliaj en la najbaraj gubernioj Menglian, Gengma, Lancang, Ŝuanggiang, Ĝenkang kaj en la Hiŝuangbanna-a kaj Dehong-a Aŭtonomaj Subprovincoj.

Ava-montaro troviĝas inter la riveroj Nugiang kaj Lancanggiang, kie serpentas montĉenoj kovrataj de densaj primitivaj arbaroj. Ĝia milda klimato en subtropika zono taŭgas por kreskado de rizo, maizo, sukerkano, tabako, mirabelo, ananaso, aleŭrito kaj aliaj plantoj, kaj en la arbaroj vivas elefantoj, tigroj, leopardoj, ursoj, cervoj kaj aliaj bestoj. Sub la tero sin kaŝas riĉaj mineralaj fontoj inter kiuj arĝento kaj plumbo estis ekspluatataj jam frue en la dinastioj de Ming kaj King.

Va-nacio estas unu el la nacimalplimultoĵoj ĉe nia sudokcidenta landlimo. En la dinastioj Han kaj Tang (de la 2-a jarcento a.K. ĝis la 9-a p.K.) la prauloj de Va-nacio tiam nomataj "Pu" kaj "Vang" jam vivis en Ava-montaro kaj la vasta regiono de ĝia nordo. En la dinastioj Ming kaj King (de la 14-a ĝis la 20-a jarcento) ĝi estis alinomata "Gula", "Hala", "Hava" kaj nun ĝi nomiĝas per "Va" kaj "Buĵaŭ". En la historio la va-oj faris heroajn batalojn kontraŭ feŭdismo kaj imperismo. Ekzemple, post okupo de Birmo la anglaj trupoj invadis en Banhong k.a. de Cangjuan, la va-naciaj triboj unuiĝis kaj faris reziston ŝultro ĉe ŝultro kune kun la najbaraj naciecaj popolanoj. En la jaro 1942 kiam la japanaj imperiistoj entrudiĝis en Ava-montaron, la va-naciaj triboj unuiĝe faris rezistan batalon kontraŭ la agresantoj kaj defendis la sudokcidentan landlimon de la patrolando.

Pro kruela ekspluatado kaj subpremado fare de la pasinta regantaro la va-nacia socio havis tre malrapidan disvolviĝon. Antaŭ la Liberiĝo la

centra regiono de Ava-montaro kun preskaŭ triono de la va-nacia loĝantaro ankoraŭ troviĝis en la stadio en kiu disfaliĝas primitiva komunumo kaj formiĝas klasa socio kaj ĝiaj aliaj regionoj kun preskaŭ du trionoj de la loĝantaro estis en la stadio de la feŭdmastra posedsistemo, krom Ĝenkang-regiono kun malpli ol dekonono de la loĝantaro en feŭdbienula socio.

Post la Liberiĝo la Komunista Partio de Ĉinio kaj popola registaro faris grandan kvanton da penigaj kaj detalaj laboroj, por ke la va-nacia socio ankoraŭ kun restaĵo de primitiva komunumo rapide eniru en la socialisman socion. La politiko de la Partio pri nacieca aŭtonomio unuafoje havigis al la va-oj rajton de nacia egaleco kaj esti veraj mastroj de la ŝtato. Ĝis la jaro 1965 fondiĝis sinsekve Cang-juan-a kaj Himeng-a va-naciaj aŭtonomaj gubernioj kaj du aliaj aŭtonomaj gubernioj de va-nacio kaj aliaj nacimalplimultoĵoj. La Partio kaj registaro ĉiam donis grandan zorgon al iliaj vivo kaj produkto. Post la Liberiĝo la ŝtato ĉiujare asignis grandajn kreditajn kaj subvencianjn monsumojn por ke ili disvolu produkton en la mont-regiono kaj vendis al ili je malalta prezo grenon, salon, agrikulturilojn, semojn kaj aliajn bezonaĵojn. Laŭ malsamaj statoj de la evolucia stadio de diversaj lokoj, la Partio kaj registaro alprenis malsamajn politikojn por helpi ilin en socia reformo, elimino de la feŭda ekspluata sistemo kaj de la restaĵo de primitiva komunumo, kaj suriri la vojon de agrikultura kooperativigo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝenerale stariĝis tie popolaj komunumoj.

Antaŭ la Liberiĝo la produkta nivelo de Va-nacio estis tre malalta. Ĉiuprintempe, oni forbruligis arbojn kaj aliajn kreskaĵojn sur la tero, sur kiu viroj fosadis kavetojn per pintigitaj lignobastonoj aŭ sulkigis teron per plugiloj kaj sekvante ilin virinoj enmetis semojn. La tero kulturita de ili plejparte

estis sekaj kampoj kaj malmulte rizkampoj. Oni neniam sterkis la kampojn kaj forlasis ilin post kiam la natura sterkoforto de tiuj kampoj estis konsumita. La agrikulturiloj estis tre simplaj, fero bezonata de ili estis enportita de aliaj lokoj. Kaj en iuj lokoj oni laboris ankoraŭ per agrikulturiloj faritaj el bambuo kaj ligno. La bovoj breditaj de ili ne uziĝis al plugado, sed kiel oferaĵo al dio je okazo de naturaj katastrofoj. Pro primitiveco de la produkta tekniko la produktokvanto estis tiel malalta ke oni povis rikolti nur dekojn da ĝinoj (1 ĝin-o = $\frac{1}{2}$ kilogramo) po muo. Tial ĉiujare akre mankis greno al la vastaj malriĉaj kamparanoj, kiuj devis kolekti herbojn por ŝtopi sian stomakon.

Post la Liberiĝo, la va-naciaj popolanoj sub la gvido de la Partio faris kun la spirito de penluktado en malfaciloj irigaciajn konstruaĵojn kaj disvolvis produkton por ĝisfunde ŝanĝi sian postĝintan fizionomion. Dum la dek jaroj de 1953 ĝis 1963 la Cangjuan-a Va-nacia Aŭtonoma Gubernio surmonite konstruis pli ol 3,000 irigaciajn kanalojn kaj 5,800 hektarojn da rizkampoj, tio kvinobligis la totalan areon de ĝiaj rizkampoj konstruitaj en la pasintaj pli ol 100 jaroj. La produktokvanto de rizo de Cangjuan okupis pli ol du trionojn de ĝia totala produktokvanto de greno, tiel ke ĝi antaŭe gren-manka fariĝis gubernio grensuperflua. En la pasinteco la vaoj neniam kulturis te-arbojn sur Ava-montaro, sed post la Liberiĝo tie aperis multaj te-ĝardenoj. Nun oni ne bezonas la te-provizon de la ŝtato kaj multe pliiĝis ankaŭ la enspezo de la komunumanoj.

Gianŝe-brigado de Hongkiu-komunumo, Cangjuan-gubernio, kun 1,400 loĝantoj de 256 familoj estas unu el la avangardaj unuoj de Junnan-provinco en lernado de Daĝaj en agrikulturo. En la malnova socio ĝi estis malriĉa loko kie frekventis tigroj kaj leopardoj, kaj nun ĝi jam fariĝis nova socialisma vilaĝo riĉa je produkto de greno kaj teo. Por dis-

Va-nacieca studentino kantas.



volvi la produkton la membroj de tiu brigado ebeniĝis per siaj propraj manoj ok montojn, fosis 120 kanaletojn, 42 laĝetojn, kaj reformis lagon Drako sankte netuŝeblan en akvorezervejon. En la jaro 1972 ili fosis sur Jangvaŝan-monto ankaŭ akvokondukan tunelon 388 metrojn longan kaj 2 metrojn larĝan, tiel ke formiĝis la irigacia reto en la tuta brigado. Krome, oni ekspluatis pli ol 1,200 muojn da ŝtuparkampoj. Antaŭ la jaro 1964 la ŝtato devis provizi Gianŝe-brigadon per greno, sed, de tiam, ĝi ĉiujare vendis al la ŝtato pli ol 100 tunojn da superflua greno kaj 5 tunojn da teo. Kaj ĝia rezervita greno multiĝas jaro post jaro. En la pasinteco ĝi havis nur simplajn agrikulturajn instrumentojn, sed nun ĝi jam posedis dizel-generatoron, mantraktorojn, draŝilojn, senŝeligilojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn.

Antaŭe la vaoj estis superstiĉaj. En multaj vilaĝoj de Ava-montaro troviĝis domoj kun lignaj tamburoj. Dum festotago, domkonstruado aŭ okazo de natura katastrofo, oni frapis tamburojn kaj oferis bovojn al dioj por ke la lastaj ilin protektu. Post la Liberiĝo la va-naciaj popolanoj konis, ke la kultado portis al ili nenion alian ol mankon de manĝaĵoj kaj vestoj. Nur post la Liberiĝo, ili disvolvis la produkton per la propraj fortoj sub la gvido de la Partio kaj ilia vivo boniĝas tago post tago. Ili sin liberigis de la superstiĉo kaj propramane forbruligis ĉiujn tamburojn kaj bov-mortig-forstojn.

De multaj jarcentoj va-nacio ne havis sian skriban lingvon. Ili kalkulis per lignoĉizado, memoris aferojn per nodado kaj esprimis siajn pensojn per difinitaj objektoj. Multaj poezioj, rakontoj, fabloj kaj legendoj bone konserviĝis en ritma formo de buŝa literaturo. Post la Liberiĝo, en la regiono stariĝis elementaj kaj mezgradaj lernejoj. En 1972 Cangjuan-gubernio havis 210 elementajn kaj mezgradajn lernejojn kun pli ol 9,100 lernantoj. Krome va-nacio jam havas siajn studentojn.

Antaŭ la Liberiĝo, en Ava-montaro estis nenia industrio kaj eĉ feraj najloj devis esti alportitaj de aliaj lokoj. Nun tie stariĝis hidraŭlikaj elektrejoj, stacioj de traktoroj kaj fabrikoj de fero, plumbo kaj agrikulturaj maŝinoj. Nur Cangjuan-gubernio sola havis en 1972 pli ol 700 va-ajn laboristojn. En ĝiaj gubernioj kaj distriktoj ĝenerale stariĝis poŝtejoj kaj en multaj grandaj vilaĝoj instaligis telefonoj. Ankaŭ la higiena afero ricevis rapidan disvolviĝon. Ĉiu gubernio havas sian hospitalon kaj elkulturis grandan nombron da sanitaristoj, akuŝistinoj kaj kamparanaj kuracistoj.



Pulvo

LA antikva laboranta popolo de Ĉinio inventis pulvon.

Por konigi ĝian eltrovon ni devas paroli pri aferoj antaŭ pli ol 2,000 jaroj.

INVENTO DE PULVO

Pulvo konsistas el sulfuro, salpetro kaj ligno-karbo. Antaŭ pli ol 2,000 jaroj, oni jam trovis sulfuron en niaj provincoj Hunan, Ŝanhi, Henan k.a. Preskaŭ je la sama tempo oni trovis salpetron kiu produktiĝis en Siĉuan, Gansu k.a. En malvarmetaj muroj estis ofte kovrataj de blankaj subtilaj kristaloj, kiujn oni nomis "mura prujno". Tio estis la ĉefa fonto de salpetro en la antikveco.

En tiu tempo, sulfuro kaj salpetro estis uzataj en farmacio. En la libro *Ŝen Nong Ben Cai Ĝing* (libro pri drogoj) verkita en Han-dinastio (204 a.K.—220 p.K.), oni registris centojn da drogoj, inter kiuj viciĝas sulfuro kaj salpetro. Kaj en 8-9 jarcentoj de post tio la ĉina popolo esploris kaj uzis ilin kiel drogojn.

En sia farmacia verko, Sun Simiaŭ (581—682 p.K.), la fama medicinisto de Tang-dinastio notis: Kiam brulanta lignokarbo falis en fajncan poton entenantan salpetron kaj sulfuron, tuj fariĝis eksplodo kaj ekflamo.

Tiaj hazardaj eksplodoj ripetigis fojon post fojo kaj eksperimentoj pri tio estis faritaj fojon post fojo. Fine oni sukcesis inventi pulvon miksinte salpetron, sulfuron kaj lignokarbon.

FAJROĴETILOJ

Antaŭ 800 jaroj, pulvo estis vaste uzata en Ĉinio. Fajropafilo inventita en la Suda Song-dinastio (1127—1279) estis farita el bambua tubo. Ĝi povis ĵeti enmetitajn ŝtonetojn 150 paŝojn foren per eksplodo de pulvo. Krom tio oni faris per pulvo ankaŭ fajroglobojn, fajrokanonon, artfajraĵojn k.a. kaj aprezi artfajraĵojn jam furoris tiam en Lin-an (la nuna Hangĝou), ĉefurbo de la Suda Song-dinastio.

FAJROSAGO


Antaŭ invento de pulvo niaj praavoj elfaris ian fajrosagon. Ĉe ĝia pinto oni alligis tolon trempitan en graso aŭ similaj brulemaj likvaĵoj. En la jaro 969, oni ŝanĝis la tolon per pulvo kaj aldonis meĉon. En milito oni bruligis la meĉon kaj pafis la sagon al malamikoj por bruligi iliajn kampadejojn kaj militŝipojn.

Poste oni elpensis la metodon antaŭenpuŝi sagon rekte per pulvo. Oni alligis paperan tubeton plenan je pulvo ĉe la sagopinto kaj meĉon ĉe la vosto de la tubeto. Kiam pulvo brulis, ĝi naskis multe da gaso, kiu rapide fuzis el la vosto kaj puŝis la sagon flugi.

En Ming-dinastio (1368—1644), oni inventis specon de raketo nomatan "fajra drako". Oni faris unue drakon el 5-futa bambua tubo. Al la "drako" oni ligis 2 grandajn raketojn kaj en la drakon metis kelkajn raketojn. Unue oni bruligis la eksterajn raketojn kaj la drako povis flugi 1-1.5 kilometrojn, kaj poste la meĉo ekbruligis la internajn raketojn kaj tiuj flugis el la buŝo de la "drako" pli malproksimen.

En la 8-a aŭ 9-a jarcento, salpetro, la ĉefa konsistiga elemento de pulvo estis transportita al Arabio kaj Persio. Araboj nomis ĝin "ĉina neĝo" kaj persoj "ĉina salo". La metodo de produkto de pulvo atingis tiujn lokojn en la 12-a aŭ 13-a jarcento. Poste araboj eksportis tion al Eŭropo.

Nun, krom en milito, pulvo ludas ege gravan rolon ankaŭ en minekspluatado, ŝtondinamitado, vojkonstruado k.a. Buntaj raketoj el pulvo faras niajn festojn pli pompaj.



Sur la Kovrilo:

Reveno de flugado

Sur la Dorskovrilo:

Printempo en la sudo de Jangzi-
rivero



EL POPOLA ĈINIO 人民中国新闻

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8 (181) 1973

Ĉefa Enhavo

Novtipa Popola Armeo	1
Ĉiam Progresema Kompanio	12
Rakontoj pri Lej Feng	17
Por Plirapidigi la Socialisman Konstruadon	23
Flankaj Produktoj de Iu Montvilaĝo	27
En la Hejmloko de Pandoj	30
Ŝparo en Konstruado	32
Afriko en Unuiĝo kaj Batalo	37
Nia Bulgemdeĥ	40
Va-nacio	45
Pulvo	47





Soldatoj kaj militanoj kune patrolas ĉe landlimo.

Landlimaj Gardistoj sur Altebenaĵo



Tibetano konigas al komandantoj kaj soldatoj la geografian staton de la loko.





Soldatoj-mezuristoj aktivantaj en glacirivero

Foto de Liu Tieŝeng

(Sube maldekstre) Kampado sur altebenaĵo

(Sube meze) Helpi antaŭurban komunumon de Lasao eduki traktoristojn



Radaristoj kontrolas la ekipaĵon.





Sanitaristo donas medicinan helpon al tibetanoj.

En kuna batalo kaj amuzado armeanoj kaj popolanoj starigis inter si profundan amikecon.



Ŝpari Ĉiun Fadenon

Observante la instruon de Prezidanto Maŭ "disvolvi produkton kaj praktiki ŝparemon", laboristoj de la 3506-a Fabriko de ĈPLA ŝpareme uzas ĉiun fadenon de la popolo kaj plene utiligas ĉiun colon da ŝtofo en ĉiuj procedoj de ŝpinado ĝis vestofarado. Kun senĉesa plibonigo de kvalito

de produktaĵoj kiel premiso, la fabriko fosis latentan ŝpareblecon kaj ŝparis por la ŝtato pli ol 1.300.000 juanojn en unu jaro.

Fotoj de Vang Guangven,
Jang Jouŝeng kaj Hiaŭ Bing


Ŝpinistinoj interŝanĝas avangardan sperton de produktado.






En ŝpinejo


Vicsekretario Liu Gi-jan (la meza en la maldekstra vico) konsiliĝas pri produktado kun laboristoj.





Juna kudristino Vej Ĉunjing diligente studas teknikon. La de ŝi kudritaj subaj randoj de dekmil vestoj estis normaj.

La fabriko produktas kotonajn litkovrilojn el forĵetita materialo.





Maljuna laboristo instruas teknikon al juna laboristino.

Maŝinriparistoj sukcese renovigis stebilon.



Peonio

Peonio apartenas al ranunkolacoj. Ĝi kreskis origine en la provincoj Ŝenhi kaj Gansu de nia lando kaj estas kulturata de pli ol 2,000 jaroj. Post longtempa kulturado peonio havas multajn speciojn, ekzemple, *Ĝuangjuanhong*, *Ziŝjoŭĉjoŭ*, *Ĝinjuanhuang*, *Oŭbi* k.a. dekoj da specioj. Ĝiaj floroj estas tre belaj kaj buntaj, kaj ofte estis admirataj de niaj antikvaj poetoj. Ĝi estis nomata kiel “Floro de Lukseco” kaj “Reĝo de la Floroj”. Kaj nun ĝi estas vaste hortikulturata kiel fama ornama vegetalo. Ĝia radika ŝelo estas uzata en la ĉina farmacio kiel drogo por kuraci malsanojn.



